

1974 majo

67-a jaro

n-ro 821 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Kunbatalanto malpli:  
F. Jonas (1899-1974)



# Vi trovos

ke ekde ĉi tiu numero nia revuo havas relative novan redaktoron, Simo Milojević (37-jara jugoslavo, v. la apudan foton), kiu transprenis redaktajn laborojn jam en januaro ĉi-jare, sed oficiale estis nomita dum la printempa Estrarkunsido. Ĉar estas almenaŭ malagrabla skribi pri si mem, la redaktoro volonte deklaras, ke li ne havas meritojn ĝis nun, sed intencas gajni ilin en ĉi tiu revuo, serioze kalkulante pri ĝiaj fidelaj kunlaborantoj kaj kritikemaj legantoj.

Al la varieco de ĉi tiu numero en specifa maniero kontribuis la komuniko de la Akademio, kiun vi trovos sur la paĝo 90. Nome, sekve de tiu komuniko, la Estraro de UEA, en sia lasta kunsido, decidis, ke ankaŭ la eldonaĵoj de UEA ne favoru difinitan formon de la landnomoj, sed lasu plenan liberecon al la aŭtoroj de unuopaj artikoloj. Tio unuafoje speguliĝas ĝuste en ĉi tiu numero.



## Enhavo

- 81 Forpasis Franz Jonas, la Federacia Prezidanto de Aŭstrio: La ŝtatestro, kiu estis — unu el ni
- 82 La printempa Estrarkunsido: Inflacio kaj efikeco
- 83 Bonaj novaĵoj el Rumanujo: Aprobata instruado
- 84 Eŭropa Esperanto-Centro: Servo por la agado en Eŭropo
- 85 En la budapeŝta klubo "Konkordo": Dudek sciencaj vesperoj, Kongreso de la Movado Freinet: Utila kunlaboro
- 86 Projekto de la Laborplano de UEA okaze de la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion
- 88 Kronach de Cranach (la urbo de la Postkongreso)
- 90 Komuniko de la Akademio de Esperanto: Pri po, -io kaj -ujo, Kiel fartas "Juna amiko"? (G. Kurucz)
- 91 Recenzoj ("L'espéranto sans peine", "Rakontoj kaj poemoj", "Amuzaj dialogoj en Esperanto", "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj", "Bonhumora injektilo", "Elektitaj verkoj (Volumo II) de Maŭ Zedong"), Laste aperis ...
- 95 TEJO-paĝo: Debato kun junaj eŭropanoj, Nova subvencio al TEJO, TEJO en soveta gvidlibro, KER en Münster
- 96 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 98 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 59a UK en Hamburgo
- 99 Oficiala informilo, Kalendaro
- 100 Anoncetoj

## La kovrilo

La esperantista kariero de Franz Jonas daŭris pli ol duonan jarcenton. Li estis ne nur la plej elstara apoganto de nia Movado en la vicoj de la plej altrangaj politikistoj, sed li estis unu el malmultaj en tiuj vicoj, al kiuj ne mankis la lasta pruvo pri la valoroj de la Internacia Lingvo, — tiu "propra sperto", kiu venu "anstataŭ malsaĝa antaŭjuĝo", pri kio la nobla homo el Vieno tiel verve parolis en la inaŭgura solenaĵo de la 55a UK en 1970.

## esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza Afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

## Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

FORPASIS FRANZ JONAS,  
LA PREZIDANTO DE AŬSTRIO:

# La ŝtatestro kiu estis unu el ni

LA ESPERANTO-MOVADO neniam havis multajn amikojn inter la plej altrangaj politikistoj, eble pro tio, ke ĝi batalas por nova mondo en kiu la homaj interrilatoj akiros ĝis nun nekonatajn dimensiojn, en kiu la interkompreniĝo ne estos rezervita por la plej altapolitika elito. Franz Jonas ne nur estis unu el la malmultaj esceptoj tiurilate, ne sole unu el la altrangaj amikoj de la Internacia Lingvo, — li estis aktiva uzanto de la lingvo, verva kunlaboranto en la Movado, li estis unu el ni. Ekde la 24a de aprilo 1974, la Federacia Prezidanto de Aŭstrio Franz Jonas, la amiko, la kunbatalanto, ne plu estas inter ni, — la nobla koro ĉesis bati, estingiĝis la revolucia flamo en la homo, kiu volis revoluciigi ankaŭ la kampon de la homa interkompreniĝo.

Franz Jonas naskiĝis la 4an de oktobro 1899 en Vieno, kiel kvara el entute ok infanoj de simpla laborista familio. Li lernis la metion de kompostisto kaj poste vastigis siajn sciojn en popola altlernejo kaj en la laborista altlernejo de Döbling. La Internacian Lingvon li eklernis en 1922 kaj tuj la sekvantan jaron sukcese trapasis la instruistan ekzamenon por poste gvidi multajn vesperajn kursojn. Kiel sekretario de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE) kaj dum kelkaj jaroj la ĉefa aktivulo de la forta laborista Esperanto-movado en Aŭstrio, li kunorganizis la 5an SAT-Kongreson (1925) en Vieno; ekde 1926 Jonas estis ankaŭ la administranto de la revuo *La Socialisto* — organo de ALLE — en kiu aperis multaj liaj artikoloj. Ĉiam skeptika pri la idearo kaj organiza strukturo de SAT, li estis la iniciatinto de la fondo de “Internacio de So-



Inaŭguro de la 55a UK en 1970: Franz Jonas ne ĝuis la “ekzilon de eminenteco”, ĉar li per siaj konvinkoj apartenis al la homoj malantaŭ la orumita brakseĝo.

cialistaj Esperantistoj” en 1933, kies vicgvidanto li fariĝis. Tiu organizaĵo apenaŭ povis efike ekagi, ĉar ĝia ĉefa kolono, ALLE, kun preskaŭ 2 000 membroj komence de 1934, estis en marto 1934 malpermesita kune kun ĉiuj aliaj laboristaj asocioj. Jonas fuĝis al Ĉeĥoslovakio, riskis reveni post kelkaj monatoj kaj estis arestita; pro manko de pruvmaterialo li estis liberigita post 14 monatoj.

La vera politika kariero de Franz Jonas komenciĝis nur en 1948, kiam li iĝis urba konsilanto pri nutraĵ-problemoj. En 1951 li elektiĝis kiel urbestro de Vieno, kaj en 1965 kiel Federacia Prezidanto; en 1971 li estis reelektita kun dua sesjara mandato, fariĝante tiel la plej longe oficanta aŭstria Prezidanto. Jonas ĝuis grandajn reputacion kaj respekton pro sia varmkora karaktero, modesteco kaj diligento.

Plenumante la altrangajn funkciojn de urbestro kaj federacia prezidanto, Jonas ĉiam trovis tempon por la Internacia Lingvo kaj ĝia Movado. Ne nur en la grandaj internaciaj aranĝoj, kiaj estis la Eŭropa Esperanto-Konferenco en 1965 kaj la 55a UK en 1970 (kiam li faris la inaŭguran paroladon, kiun la aktivuloj de la Esperanto-movado ofte devas rekonsideri), sed ankaŭ dum pluraj ŝtataj vizitoj, en kies programo li ĉiam trovis tempon por akcepti reprezentantojn de la loka aŭ landa Movado. Ankaŭ pro tio la definitiva pezo de la lasta novaĵo pri Franz Jonas ne trafis nur la aŭstrian popolon, sed ĝi dolore resonis tra la tuta Esperanto-movado. La doloro estas tutmonda, ĉar temas pri homo de mondaj staturo kaj konceptoj.



# Inflacio kaj efikeco

DUM TRI TAGOJ, de la 5a ĝis la 7a de aprilo, en la Centra Oficejo en Rotterdam okazis la kutima printempa kunsido de la Estraro de UEA. Fariĝis ankaŭ kutimo, ke ĝuste en la tagordo de tiu ĉi printempa kunsido troviĝas multe pli da eroj, ol en la aliaj du regulaj kunvenoj de la Estraro (unu dum la kongresa semajno, kaj alia dum la jarŝanĝaj semajnoj). La kunsido, pri kiu ĉi tie temas, havis antaŭ si tagordon kun 18 punktoj, kiu estis displita en minimume 85 erojn, traktitaj dum almenaŭ 25 horoj de efektiva streĉa laboro. Oni facile povas imagi, ke necesus tuta numero de nia revuo por detale prezenti la diskutitajn demandojn, kio ja nature nek eblas, nek necesas, ĉar multaj eroj el la tagordo koncernis pure teknikajn aferojn, kiuj ne interesas la plimulton de niaj legantoj. Ĉi tie ni klopodos ekstrakti la plej gravajn demandojn, pri kiuj okupiĝis la Estraro.

## Malagraba financa rekordo

Ĉar, almenaŭ laŭ la nuna stato de la kontoj, la jaro 1973 alportis rekordan malprofiton de preskaŭ sesdek mil guldenoj, la financaj demandoj okupis pli-malpli unu tutan tagon de la Estrar-kunsido. Fronte al tiu impresa sumo, estis malfacile tuj ĝuste pesi la kaŭzojn kaj klarigojn de la malprofito. Tamen tiuj klarigoj montras jenon:

Almenaŭ dudek tri mil guldenoj de la malprofito fontas el supertakso de la grandeco de la 58a UK en Beogrado. Oni siatempe kalkulis, ke la 58a UK estos granda kiel la kongresoj en Varsovio, Sofio aŭ Budapeŝto, sed la realo estas, ke la Kongreso en Beogrado montriĝis unu el la plej malgrandaj dum la lastaj dudek jaroj. Ĉar la Centra Oficejo ricevas por sia parto de la kongresaj laboroj fiksitajn procentaĵojn el la kongreskotizoj, malgranda kongreso preskaŭ aŭtomate signifas malprofiton por UEA. Kvankam la fina bilanco pri la Kongreso en Beogrado verŝajne montros profiton, tio ne influos la malprofiton de UEA, ĉar profitoj de la Universalaj Kongresoj estas ĉiam uzataj por informado. Plie, la buĝeto 1973 antaŭvidis aĉeton de dua kompostmaŝino, kiu kun la jam posedata devus permesi enspezon de pli ol tridek mil guldenoj pro grafikaj laboroj. Ĉar tiu plano ne realiĝis, la enspezoj atingis nur la duonon de tiu sumo. Mallonge dirite, la Kongreso kaj tiu dua kompostilo figuras en la malprofito per ĉ. 40 000 gld., kio jam estas du trionoj de la tuta

malprofito. La trian trionon klarigas la fakto, ke la sumo de salajroj kaj sociaj asekuroj superis la buĝeton je preskaŭ dudek mil guldenoj. Al tio ni revenos ĉi-sube. Fine, temis pri la lasta jaro antaŭ la kotizaltiĝo, kaj jam nur la senhalta inflacio signifas malprofiton.

Aliflanke, el la bilanco oni vidas, ke la Asocia Kapitalo — dank'al la alfluo de 86 novaj dumvivaj membroj, krom donacoj kaj heredaĵoj — malkreskis nur je ĉ. dek mil guldenoj. Tio signifas, ke la kapitala pozicio de UEA ne tiel malboniĝis, kiel la deficitito 1973 povis timigi.

## Altigi la efikecon de la Centra Oficejo

Tre detale estis traktitaj ankaŭ pluraj demandoj pri la funkciado de la Centra Oficejo. Dum la pasinta jaro la Oficejon forlasis tri kunlaborantoj kun plurjara sperto, kaj dum pluraj monatoj estis aktuala la demisio de la direktoro, kiu tamen fine decidis resti. Ĉio tio grave influis la normalan evoluon de la laboroj kaj ĉefe kaŭzis la transpaŝon de la buĝetaj limoj por salajroj, ĉar necesis serĉi, elprovi (ne ĉiam sukcese) kaj enkonduki plurajn novajn oficistojn. Tamen la aferoj iom post iom ordiĝas, kion celis ankaŭ la nunaj decidoj de la Estraro, ke d-ro Sadler estu liberigita de la redaktoraj funkcioj en nia revuo kaj en *La Monda Lingvo-Problemo*, kies redaktadon transprenis prof. d-ro Richard E. Wood el Usono.

La Estraro dediĉis apartan atenton al la eldonaĵoj de la Asocio, klopodante certigi ilian aktualecon rilate la enhavon kaj aperdatojn. Nia revuo pli-malpli rekapitis sian kutiman aperritmon, dum la Jarlibro, kvankam jam delonge prespreta, spertas la nederlandan paperkrizon. Nun oni presas la broŝuron *Por pli efika informado* kaj la lernolibron de TEJO *Ĉu vi parolas tendare?*, kun subvencio el la Eldona Fondaĵo. La aperdato de la monumenta verko *Esperanto en perspektivo*, kiu havos pli ol 800 paĝojn, bedaŭrinde devis prokrastiĝi al la fino de ĉi tiu jaro, ĉar la laboroj pri ĝi (korektoj, ĝisdatigoj, ilustraĵoj) montriĝis multe pli temporabaj, ol oni povis antaŭvidi.

La Estrar-kunsido traktis ankaŭ tutan aron da demandoj lige al la ĉi-jara UK en Hamburgo, sed temis ĉefe pri definitivigo de la kongresa programo, pri kio vi povas informiĝi en la prikongresa rubriko de ĉi tiu numero de la revuo. Apartajn zorgojn donis la fakto, ke oni ankoraŭ ne havas kongresurbon por 1975.

## LA PREZIDANTO DANKAS

Okaze de la artikolo aperinta en la aprila *Esperanto*, "UEA en danĝero de malintegriĝo", mi ricevis tian amason da esprimoj de solidareco kaj persona simpatio, ke estas por mi maleble respondi al ĉiu aparte. Pardonpetante pro tio, mi certigas ĉiujn skribintojn, ke mi alte aprezas ilian apogon, kaj tutkore dankas.

Ivo Lapenna



# Aprobita instruado

RUMANUJO apartenas al tiuj landoj, kiuj spertis relative strangan osciladon en la populareco de la Internacia Lingvo kaj forteco de la Esperanto-Movado. Kvankam la unua *Vortareto por Rumanoj* aperis jam en 1889, oni devis atendi la aperon de la unua lernolibro ĝis 1907, kiam fondiĝis ankaŭ la Rumana Esperanto-Societo. Tuj poste la Movado ekfloris, kaj en 1909 okazis la unua nacia kongreso. Post la Unua Mondmilito, en 1920 aperas Andreo Cseh kun sia instrumentado kaj la Movado en Rumanujo baldaŭ spertas siajn plej sukcesajn jarojn, liverante al la internacia scenejo tiajn aktivulojn kiaj estis Cseh, Morariu, Pragano kaj Harabagiu. Tiutempe en Rumanujo en la Internacia Lingvo aperadis gazetoj, libroj, svarmis kursoj, funkciis ne nur la Rumana Esperanto-Societo sed ankaŭ Rumana Centro Esperantista, kiu posedis domon, presejon, bibliotekon. Sed la elmigro de la menciitaj pioniroj kaj la baldaŭa mondmilito signifis provizoran kaj jardekojn longan silentigon de la Movado en Rumanujo.

Post la fino de la Dua Mondmilito, la Movado relative rapide revigliĝis en preskaŭ ĉiuj najbaraj landoj (Bulgario, Jugoslavio, Hungario, Sovet-Unio), sed ne en Rumanujo. Kvankam la veraj kaŭzoj de tia stato ankoraŭ atendas kompetentan klarigon, ŝajnas, ke nia revuo jam antaŭ dek jaroj prave suspektis, ke la tiutempe nefavora rilato de la ŝtataj instancoj al la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado grave ŝuldiĝis al renoma rumana lingvisto, akademiano Aleksandro Gaur, kiu en sia verko *Studii de lingvistica generala* (1960) aŭtoritate, sed malkompetente referencis al la Internacia Lingvo (v. *Esperanto*, majo 1964, p. 82-83). Tamen, kiel tio ankaŭ aliloke pruviĝis, eĉ jardekojn longa neekzisto de la organizita Movado en iu lando ne nepre signifas ekstermon de la interesiĝo



Bukareŝto: Mankas aktivecoj en la ĉefurbo.

pri la Internacia Lingvo. Pluraj lastatempaj novaĵoj el Rumanujo konfirmas tion.

En la urbo Craiova, universitata centro, prof. Petre I. Fetoiu ĵus ekgvidis tutan serion da kursoj ĉe la Universitato. Ne temas pri privata provo de izola aktivulo, sed pri kursoj, kiuj okazas laŭ oficiala aprobo de la Ministerio pri Instruado. La kursoj okazas en la kadro de la Katedro de Modernaj Lingvoj de la Filologia Fakultato, kaj ili estas oficiale anoncitaj per cirkulero, kiun subskribis la estro de la Katedro d-ro Ion Pătrașcu. Oni antaŭvidis apartan kurson por la membroj de la administra kaj pedagogia staboj de la Universitato, kaj apartajn kursojn por la gestudentoj. La estraro de la Universitato konsentis financi ankaŭ la multobligadon de la necesa studmaterialo (lernolibro kaj ambaŭdirektaj vortaroj). Ankaŭ la Universitata Senato devis esprimi sian opinion pri la kursoj kaj ankaŭ ĝia opinio estis pozitiva.

Jam pli frue, en la fino de novembro 1973, la sama Ministerio pri Instruado per aparta dekreto permesis la organizon de kursoj de la Internacia Lingvo en la vasta reto de la popolaj universitatoj, klerigaj institucioj, kiuj sian aktivecon direktas al la plej larĝaj popoltavoloj.

Ankaŭ en aliaj lokoj de Rumanujo okazas tre vigla aktiveco kaj funkcias tuta aro da kursoj de la Internacia Lingvo. En Cluj, ĉe la urba kulturdomo, la lingvon lernas plurdeko da personoj en kurso, kiun organizis pup teatra aktorino Julia Sigmond, kaj kiun gvidas E. Schlesinger kun la helpo de T. Mindruțiu. Ĉe la Junulara Domo "Sicullus" en la urbo Odorheiu-Secuiesc, funkcias Esperanto-rondo kaj kurso, gvidataj de ing. Kustán kaj la instruistino K. Bilous. En Oradea jam pasintjare f-ino A. Radó gvidis kurson kaj tion ripetas ankaŭ en ĉi tiu jaro. S-ro J. Szabó gvidas kurson en la urba kulturdomo de Sighet. Kaj, tio ĉi estas nur hazardaj informoj, kiuj atingis nin, kaj kiuj permesas konjekti, ke io grava okazas en Rumanujo rilate la Internacian Lingvon. Ĉio ĉi tamen ne estas mirinda, des pli se oni scias, ke ĝuste Rumanujo, estante izolita romanida lingvo-insulo en la ĉefe slavlingva orienta Eŭropo, simile al la najbara Hungario, devus multe pli akute senti la mankon de efika internacia komunikilo, ol kelkaj aliaj landoj. Por miri restas, pro kiaj kaŭzoj la Internacia Lingvo en Rumanujo bezonis tiom da jardekoj por nur komenci reakiradi siajn antaŭajn poziciojn en la socio. La tajdo de la ne plu spontana, sed aprobita aktiveco tutcerte baldaŭ stariĝos ankaŭ la demandon pri la manko de tutlanda organizaĵo, kiu efike kunordigus la ekzistantajn kaj planatajn klopodojn.



# Servo por la agado en Eŭropo

LA PRINTEMPA KUNSIDO de la Estraro de UEA havis en sia tagordo por la 6a de aprilo ankaŭ la eron sub la nomo "Eŭropa Esperanto-Centro". Tiucele al la kunsido estis invititaj kiel gastoj tri reprezentantoj de la Centro: d-ro P. Denoël, prezidanto, s-ino J.H. Hoekstra-Sieders, administrantino, kaj d-ro G.F. Makkink, reprezentanto por Nederlando. Post vigla unuhora interŝanĝo de opinioj, oni venis al konkludoj, kiujn eblas resumi jene: 1) UEA rekonu la agadon de la Centro kaj donu al ĝi moralan apogon. 2) UEA insistu ankaŭ siaflanke ĉe la Landaj Asocioj pri la graveco de ĉi tiu agado kaj instigu ilin nomi komisiitojn pri la eŭropa agado. 3) Ĉiuj klopodoj rilate la Internacian Lingvon ĉe la instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo estu farataj en la nomo kaj pere de la Centro, kiu funkcii kiel kunordiganto. 4) La Centra Oficejo de UEA disponigu al la Centro teknikan helpon en la formo de multobligado de bulteno, perado de abonoj k.s.

Ĉar nia revuo ĝis nun ne raportis pri la Eŭropa Esperanto-Centro, necesus mallonge prezenti ĝin al la legantoj.

La Centro fondiĝis dum la unua Eŭropa Esperanto-Kongreso, okazinta en Luksemburgo komence de junio pasintjare. La ĉefa celo de la Centro estis formulita kiel perado de informoj pri la Internacia Lingvo, ne nur al la instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, sed ankaŭ al la kun ili kunlaborantaj instancoj en landoj kiuj rilatas kun EEK. Aparte estis akcentita la graveco de la kreado de influgrupoj, kiuj en siaj landoj kaj medioj batalus por la penetro de la Internacia Lingvo en la instituciojn de EEK.

Kiel akcentite dum la Estrar-kunsido en Rotterdam, kaj kiel oni povas legi en la jara raporto de la Centro (prezentita al la 2a Eŭropa Esperanto-Kongreso, meze de aprilo en Lieĝo, Belgio), en kelkaj landoj la eŭropa agado bone evoluas, dum en aliaj oni malmulton aŭ apenaŭ ion faris. Al la landoj en kiuj la eŭropa agado



D-ro Pol Denoël kaj s-ino J.H. Hoekstra-Sieders: La Eŭropa Esperanto-Centro ne estas konkurenco, sed ĝi celas esti servo al la landaj asocioj.

bone evoluas apartenas FR Germanio, Belgio, Nederlando kaj parte ankaŭ Britio. Estas sufiĉe nekompreneble kial en la agado postrestas Francio, kiu havas fortan landan asocion, kaj Danlando en kiu la agado inter la parlamentanoj siatempe estis sufiĉe vigla. Ankaŭ en Italio malmulto estas farita, dum en Irlando kaj Luksemburgo ne eblas atendi grandajn rezultojn pro la malforto de la Movado en tiuj du landoj.

En la unua jaro de sia funkciado, la Eŭropa Esperanto-Centro notis plurajn sukcesojn, inter kiuj elstaras la rezultoj de la kunlaboro kun la Eŭropa Centro de Kulturo en Ĝenevo, en la kadro de ĝia Kampanjo por Eŭropcivitisma Edukado. Temas pri la Esperanta eldono de *Eŭropa dokumentaro*, kies unua kajero aperis en februaro, kaj la aliaj tri de la jarkolekto 1974 estas atendataj en majo, oktobro kaj decembro. La nova eldonaĵo enhavas valorajn kontribuadojn pri edukado, lingvoinstruado kaj problemoj de la Eŭropa Parlamento. Jara abono por *Eŭropa Dokumentaro* estas 9 svizaj frankoj, kaj oni povas mendi la periodaĵon ne nur ĉe la eldonanto (122 Rue de Lausanne, CH-1202 Genève, Svislando), sed ankaŭ ĉe la Libro-servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Nur de la nombro de abonantoj dependas la plua eldonado de la kajeroj de *Eŭropa Dokumentaro* kies eldono en la Internacia Lingvo bezonas minimume 500 legantojn.

Necesas ankoraŭ diri, ke la Eŭropa Esperanto-Centro ne estas ia nova organizaĵo, konkurenca al la landaj asocioj kaj internaciaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la eŭropa agado. La Centro nur pretendas esti iasenca servo de la landaj asocioj, kiun ili ne preteriru en siaj klopodoj ĉe la instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo. La forto kaj efikeco de la Centro dependas de la graveco kaj apogo, kiujn al ĝi donos la landaj asocioj. Tamen, la graveco de la agado en Eŭropo restas eksterduba, speciale nun kiam ĝuste en Eŭropo la lingva problemoj ĉiam pli kaj pli komplikiĝas.



# Dudek sciencaj vesperoj

KIEL ANONCITE pasintjare (v. *Esperanto*, febr. 1973, p. 28), sukcese evoluas la ambicie planita serio de fakaj prelegoj (kun diskuto) sub la nomo Sciencaj Vesperoj.

En la periodo de novembro 1972, kiam okazis la unua aranĝo en la serio, ĝis februaro 1974, la iniciato bone evoluis kaj enkadre de dudek Sciencaj Vesperoj estis prezentitaj kaj diskutitaj prelegoj pri geologio, termodinamiko, hidrotekniko, astronomio, kriminologio, lingvistiko, elektroniko, komputiloj, metalurgio, biosfero, entomologio, petrolkemio, historio, hidraŭlika modelumado k.a. Oni eĉ eldonis la unuan informan bultenon titolitan *Komunikaĵoj*.

Inter la prelegintoj troviĝis Ottó Haszpra, doktoro de la teknikaj sciencoj, kaj Aurél Ponori Thewrewk, vicdirektoro de astronomia observatorio, kiuj ambaŭ sukcese prelegis ankaŭ en la Internacia Somera Universitato de la beograda Universala Kongreso. La plej sukcesan lingvistikan prelegon faris la ĉie konata eminentulo de la Esperanta literaturo, d-ro Kolomano Kalocsay. La plej aktiva preleganto de la Vesperoj

estis Antal Münnich, redaktinto kaj unu el la verkintoj de la kvinlingva komputila vortaro, kiu jam estas vaste uzata en la landoj de la Orienta Eŭropo.

Pluraj prelegoj jam estis publikigitaj en la dumonata revuo *Hungara Vivo*, aliaj estas preparataj por publikigo en la supremenciita *Komunikaĵoj*. Mallonga resumo pri la okazintaj prelegoj regule aperas en la *Budapeŝta Informilo*, kiu fariĝas ĉiam pli alloga revuo.

Plifortigo de la internaciaj kontaktoj de la Klubo estas ankoraŭ bezonata kaj aktiva partopreno de eksterlandaj fakuloj estas bonvena. Vizitantoj de Budapeŝto povas partopreni la vesperojn la duan (ofte ankaŭ la kvaran) lundon de ĉiu monato (escepte de julio kaj Aŭgusto) inter la 19a kaj 21a horoj. Loko: Orvos-Egészségügyi Szakszervezet székháza (sidejo de la Kuracista-Sanitaria Sindikato), Münnich Ferenc u.32; ducent metrojn de la subtera fervoja stacio Kossuth-tér.

Interesitoj povas turni sin ankaŭ al la iniciatinto de la Vesperoj: d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. u. 5, H-1054 Budapest, Hungarujo.

## KONGRESO DE LA "MOVADO FREINET":

# Utila kunlaboro

Fine de marto 1974, en la Universitato de Montpellier, Francujo, okazis la jarkongreso de la eduka movado "Institut Coopératif de l'Ecole Moderne" (mallonge, la "Movado Freinet", fondita en 1927 de la franca edukisto Célestin Freinet, kiu celis plivigligi la edukadon per la enkonduko de novaj, pli praktikaj metodoj, kiuj baziĝas sur la emoj kaj intereso de la lernantoj pli bone ol sur tiuj de la instruantoj).

Ĉeestis pli ol 1000 francaj kaj alilandaj geinstruistoj, inter kiuj gesinjoroj Kimie kaj Raif Markarian, kiuj venis kiel gastoj de la Esperanto-sekcio de la "Movado Freinet".

Japandevena s-ino Markarian demonstraciis la sorobanon, japanan kalkulilon, en fakkunveno de la matematikistoj; s-ro Markarian, angla lernejestro, prelegis pri la vivo de la brita eduka pioniro A.S. Neill, kies ideoj multrilate similis al tiuj de Freinet.

Gesinjoroj Markarian deĵoris ĉe la konstanta Esperanto-ekspozicio, aranĝita de s-roj L. Lentaigne kaj E. Plutniak kaj iliaj kunlaborantoj en la Esperanto-sekcio. Neesperantistaj kongresanoj ofte aŭdis la Internacian Lingvon kaj povis konstati ĝian praktikan valoron en internacia kongreso.



Atentigi pri la valoroj de Esperanto en sia propra faka medio: Ges-roj Markarian kun s-ro E. Plutniak (maldekstre) en la Kongreso de la Movado Freinet.



# Projekto de la laborplano

## DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA JARDEKO DE AKTIVADO POR KONTRAŬBATALI RASISMON KAJ RASAN DISKRIMINACION

Ĉi tiun projekton de la laborplano ellaboris la prezidanto de UEA. Li diskutigis ĝin dum la Estrar-kunsido en Rotterdam, la 7an de aprilo 1974. La Estraro unuanime decidis elmontri la projekton al kiel eble plej vasta publika diskuto, aperigante ĝin en la revuo, antaŭ ol aprob-cele prezenti ĝin al la Komitato de UEA dum la 59a Universala Kongreso en Hamburgo. Eventualajn rimarkojn aŭ sugestojn bv. sendi rekte al la adreso de la prezidanto. Por pliaj detaloj pri la Jardeko v. ankaŭ la martan numeron de nia revuo (paĝoj 41–42).

### 1. ENKONDUKO

**1.1 Celo:** Per sia Rezolucio 2919 (XXVII) de la 15a de novembro 1972 la Ĝenerala Asembleo de UN decidis organizi vastan, dekjaran agadon kun la celo elradikigi rasismon kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio. Per la Rezolucio 3057 (XXVIII) de la 2a de novembro 1973, titolita Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion (en la plua teksto “Jardeko” aŭ “Kontraŭrasisma Jardeko”), la Ĝenerala Asembleo aprobis la Programon de agado kaj konfirmis la antaŭan decidon, ke la Jardeko komenciĝu la 10an de decembro 1973, nome la tagon de la 25-jara datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La Programo estas entenata en la aldono al la Rezolucio kiel Dok.A/RES/3057 (XXVIII). Efektive, la Jardeko estis lanĉita tiun tagon dum speciala kunveno de la Ĝenerala Asembleo.

**1.2 Plua Evoluo:** La Rez. 3057, interalie, alvokis ĉiujn registarojn, la organojn de UN, la specialigitajn kaj aliajn interŝtatajn organizaĵojn, kaj ĉiujn neregistrajn organizaĵojn (NRO-jn) en konsultaj rilatoj “partopreni en la agadoj de la Jardeko por intensigo kaj vastigo de siaj klopodoj direktitaj al rapida elradikigo de rasismo kaj diskriminacio”. Ĉar UEA troviĝas en konsultaj rilatoj kun Unesko (Kategorio B) kaj UN (“sur la listo”), la alvoko estis direktita ankaŭ al ĝi. Sekvante la alvokon de la Rez. 2919, en 1973 Unesko komencis prepari sian longdaŭran Programon pri interrasaj kaj intertnaj rilatoj, ĉefe surbaze de la Fina Raporto de la Kunveno de Ekspertoj pri la Konceptoj de Raso, Identeco kaj Digno (SHC/MD/21 de la 17a de novembro 1972). En 1973 okazis ankaŭ diversaj seminarioj kaj alispecaj kunvenoj organizitaj de NRO-j, inter kiuj elstaras la Simpozio pri Rasismo fine de marto 1973. UEA aktive partoprenis en la preparado de la Simpozio kaj en ĝiaj laboroj pere de siaj reprezentantoj en Londono kaj Parizo (v. la Estraran Raporton por 1973/74, IX/B/3), kaj kontribuis al la fina starpunkto entenata en la Decidoj de la Konferenco de NRO-j de novembro 1973. La enmeto de la lingva

aspekto en la abundan dokumentaron pri rasismo kaj rasa diskriminacio ŝuldiĝas almenaŭ parte al intervenoj de UEA.

**1.3 Partopreno en la Jardeko:** Per sia letero de la 7a de majo 1973 (DASS/72/538.1) la Departemento de Sociaj Sciencoj de Unesko komunikis al UEA la projekton de la Programo de Unesko por la Jardeko kaj petis komentojn. Aliflanke, la fako pri Homaj Rajtoj de la Sekretariato de UN, per siaj leteroj de la 10a kaj 23a de januaro 1974 (SO 237/4) petis sugestojn kaj informojn pri la agadoj, kiujn intencas entrepreni UEA en la Jardeko. Al ambaŭ UEA respondis, ke, konforme al art. 4 de sia Statuto, ĝi donas plenan apogon al la planitaj agadoj de UN kaj Unesko, sed aparte emfazis la lingvan aspekton de la tuta kompleksa problemaro. Por povi sukcese kontraŭbatali rasismon — estas dirite en la dokumento — necesas ne sole agadi kontraŭ ĝiajn eksterajn manifestiĝojn per la jam establitaj metodoj, sed ankaŭ — fakte unuavice — forigi ĝiajn radikojn. La lingva obstaklo estas sendube unu el ili ne nur en mondaj dimensioj kaj en regionaj internaciaj rilatoj, sed ankaŭ interne de unuopaj ŝtatoj kun plurlingvaj komunaj. Tial UEA proponis al UN kaj Unesko doni al tiu demando la plej seriozan konsideron en la estontaj studoj kaj agadoj. Siavice UEA promesis intensigi siajn klopodojn sur tiu ĉi kampo kaj, ne neglektante la aliajn aspektojn, dediĉi specialan atenton al la lingva obstaklo kiel unu el la kaŭzoj de rasismo, unuflanke, kaj al lingva diskriminacio kiel esenca parto de kultura diskriminacio, aliflanke.

### 2. AGADOJ

**2.1. Bazaj difinoj:** En siaj agadoj laŭ tiu ĉi Laborplano, UEA akceptas jenajn bazajn difinojn, se necese kun precizigoj aŭ korektoj, studotaj dum la Jardeko:

**2.1.1 Raso, nacio, etna grupo kaj konektitaj esprimoj** kiel “identeco kaj rasismo”, “digno kaj rasismo”, “digno kaj personeco”, k.a. — konforme al la dokumento de Unesko SHC/MD/21 de la 17a de novembro 1972.



2.1.2 Rasa Diskriminacio estas “kiu ajn distingo, ekskludo, limigo aŭ prefero bazita sur raso, koloro, lingvo, deveno aŭ nacia aŭ etna origino kun la celo aŭ finrezulto detrui aŭ endanĝerigi la rekonon, ĝuadon aŭ praktikadon, en egaleco, de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj en la politika, ekonomia, socia aŭ kultura sferoj, aŭ en kiu ajn alia sfero de publika vivo”, konforme al Art. 1 de la Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio.

2.2 **Apogo al UN kaj Unesko:** UEA donas sian apogon al la Programoj de UN kaj Unesko, precipe al tiuj partoj, kiujn ĝi laŭ siaj celoj kaj organiza strukturo povas efike subteni, per

2.2.1 Diskonigo de la celoj de la Jardeko, de partoj de la Programoj kaj de aliaj materialoj en la Esperanto-gazetaro, radio-elsendoj en Esperanto, bultenoj, lekcioj en ISU, prelegoj kaj aliaj rimedoj;

2.2.2 Partopreno en seminarioj, rondtablaj konferencoj, simpozioj kaj aliaj renkontiĝoj sub aŭspicio de Unesko aŭ UN en ligo kun la Jardeko, kaj diskonigo de la ĉefaj konkludoj;



2.2.3 Instigoj direktitaj al la registaroj aliĝi, ratifi kaj realigi la principojn de la Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio kaj de aliaj konvencioj en la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj;

2.2.4 Kontribuo, ĉu rekte, ĉu pere de ILEI, al formala aŭ neformala instruado de gejunuloj kaj infanoj pri la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj edukado al observado de tiuj rajtoj kaj liberecoj;

2.2.5 Organizo, ĉu memstare, ĉu en kunlaboro kun aliaj NRO-j, de seminarioj kaj konferencoj rilatantaj al la celoj de la Jardeko, sur loka, landa, regiona kaj monde internacia niveloj.

2.3 **Lingvo kaj Rasismo:** Konvinkita, ke foresto de komunikado inter rasaj, naciaj kaj etnaj komunaj aŭ grupoj pro la lingvaj baroj prezentas la ĉefan obstaklon al reciproka kompreniĝo kaj tial samtempe estas unu el la bazaj kaŭzoj de rasaj antaŭjuĝoj kaj rasa diskriminacio, UEA dediĉos apartan atenton al la rilatoj inter lingvo kaj rasismo en ĉiuj ĝiaj aspektoj, sed unuavice al la du fundamentaj: (i) lingvodiverseco kiel unu el la fontoj de rasismo, kaj (ii) formoj de lingva diskriminacio kiel parto de diskriminacio ĝenerale, precipe kul-

tura diskriminacio. Por la realigo de tiu celo la ĉefaj taskoj estas:

2.3.1 Esploroj, studoj kaj enketoj, entreprenotaj de CED, pri lingvo kaj rasismo (laŭ la supra difino) sur internacia, regiona, landa kaj loka niveloj; publikigo de la rezultoj en dokumentoj de CED, en *La Monda Lingvo-Problemo* kaj en aliaj periodaĵoj; sendado de la ĉefaj dokumentoj al Unesko kaj UN;

2.3.2 Studoj kaj enketoj aparte pri la multflankaj problemoj, kiujn frontas gastlaboristoj en diversaj landoj pro la lingvaj baroj;

2.3.3 Studoj entreprenotaj de la internaciaj Esperanto-organizaĵoj de juristoj kaj edukistoj pri la juraj kaj edukaj aspektoj de la rilato inter lingvo kaj rasismo;

2.3.4 Konferencoj kaj seminarioj pri lingvo kaj rasismo organizotaj ĉu rekte de UEA aŭ de ĝia Junulara Sekcio, ĉu de la landaj, lokaj aŭ fakaj Esperanto-organizaĵoj;

2.3.5 Specialaj kunvenoj kaj debatoj, skribaj aŭ oratoraj konkursoj, prelegoj en ISU kaj en kunsidoj de fakaj asocioj, ĉio ĉi organizota laŭbezzone en la kadroj de Universalaj Kongresoj de Esperanto, Internaciaj Junularaj Konferencoj de TEJO, internaciaj kongresoj de fakaj organizaĵoj, landaj Esperanto-kongresoj;

2.3.6 Intensigo de agadoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, organizata de UEA ĉiujare en februaro;

2.3.7 Kursoj de la Internacia Lingvo (Esperanto), organizotaj de la koncernaj landaj aŭ lokaj Esperanto-organizaĵoj, en la medioj de izolitaj lingvaj minoritatoj, ekzemple gastlaboristoj kaj enmigrintoj, kun la celo ebligi komunikadon kun la alilingvanoj, forigi antaŭjuĝojn kaj tensiojn, faciligi integriĝon sen perdo de la propra rasa, nacia aŭ etna identeco;

2.3.8 Eldono de glumarko simbolanta la celon de la Jardeko, kun emfazo je la lingva aspekto; eldono de poŝtkartoj kaj aliaj presaĵoj kun la sama simbolo;

2.3.9 Vasta diskonigo de ĉiuj agadoj de UEA kaj de ĉiuj ĝiaj aliĝintaj aŭ kunlaborantaj organizaĵoj per ĉiuj rimedoj de informado en Esperanto kaj en naciaj lingvoj;

2.3.10 Ev. aliaj agadoj konforme al la ĉefa celo.

### 3. ATINGOTAJ REZULTOJ


La celo de UEA estas atingi jenajn rezultojn:

3.1 Maksimume helpi la realigon de la Programoj de Unesko por forigi rasismon kaj rasan diskriminacion kiel unu el la grandaj malbonoj, kiu ankoraŭ skurĝas la homaron;

3.2 Antaŭenigi la respekton por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, firmigante tiamaniere ankaŭ la kondiĉojn, kiujn UEA rigardas kiel esencajn por sukcesa laboro (Art. 4/II de la Statuto);

3.3 Per progresigo de la Internacia Lingvo, altigo de la nombro de ĝiaj uzantoj kaj, sekve, plia vastigo de ĝiaj aplikoj en la praktiko, siavice kontribui al forigo de rasismo kaj de rasa diskriminacio, inkluzive la lingvan.





La mezepoka fortikaĵo-kastelo Rosenberg majeste dominas la panoramon de la postkongresa urbo Kronach.

# Kronach de Cranach

La ĉi-jaran kombinon de la kongresa kaj postkongresa urboj oni verŝajne povus konsideri ideala: la unua – mondhavena grandurbo, industria kaj komerca centro, la dua – pitoreska, histoririĉa urbeto, perdita ie en la arbaroj de la germana federacia ŝtato Bavario. Al Hamburgo oni iros laborcele, por partopreni kaj pligrandigi la ĉefan jaran manifestacion de la tutmonda Esperanto-movado, pro la prestiĝo de la aranĝo kaj pro la famo de la kongresurbo. Al Kronach (Kronaĥ) onin kondukos scivolo, nostalgio pri naturo, emo kaj bezono ripozi. Kia do estas tiu Kronach?



Kronach: La polucia industrio ankoraŭ ne malkovris la urbeton, kiu "naĝas" en verdaĵoj.

LUCAS CRANACH (Lukas Kraniaĥ) estas pli fama ol la urbo Kronach de kiu la fama pentristo, vivinta antaŭ kvin jarcentoj, prunteprenis sian nomon. Kelkaj verkoj de Cranach, samtempulo de Dürer (Direr) kaj amiko de Luther, ankaŭ nun ornamas salonojn de la malnova urbodomo de Kronach, dum la aliaj pentraĵoj de Cranach apartenas al la kolektoj de kelkaj plej famaj muzeoj de Eŭropo.

Sed Kronach ne fanfaronas nur pri la fama pentristo, ĝi havas multajn aliajn allogaĵojn por siaj gastoj. Tri riveretoj kunfluas ĉe la urbo, "forgesita" en blue verdaj arbaroj de la Supra Frankonio, ie vojmeze inter Berlino kaj Munkeno. Eble tiu idilia "perdiĝo" de Kronach helpis, ke la urbon ankoraŭ ne malkovris poluciaj industrioj, tiel, ke la temo pri la protektado de la natura hom-medio en Kronach havas nur preventan dimension. Oni ja tamen ion produktas en Kronach, kiu en la komerca mondo estas konata pro sia porcelano, pro radio- kaj televid-aparatoj kaj lignaĵoj.



La idilian panoramon de la mezepoka urbo regas la fortikaĵo "Feste Rosenberg", plurdoma kastelo jam rezistinta siatempajn uraganojn de la Tridekjara Milito (1618-1648). Oni kutimas aserti, ke la fortikaĵo estas "juvelo de la germana mezepoka konstruarto", apartenanta sendube al la plej belaj kasteloj de la tuta vasta lando. Hodiaŭ la kastelo interalie servas kiel regiona muzeo en kiu oni povas konatiĝi kun la kostumoj kaj ilaro, kiujn uzis la mezepokaj flosistoj, transportantaj la arbotrunkojn de la frankoniaj arbaroj ĉien tra Germanio, eĉ ĝis la fora Nederlando.

En la turisma mondo Kronach estas konata pro sia folkloro aranĝo de "la Pafista Festo" (germanlingve: Schützenfest), okazanta ĉiujare meze de aŭgusto, do ĝuste dum la Oficiala Postkongreso (4a – 10a de aŭgusto 1974). La programo de la Postkongreso enhavas plurajn erojn, kiuj plektiĝas kun la programo de la turisma aranĝo al kiu venas miloj da homoj, ofte eĉ el tute foraj lokoj.

La Postkongreson, okazontan sub la Alta Protekto de la Urbestro de Kronach, kiel ni jam skribis en la aprila numero de la revuo, ĉi-jare organizas la urba turisma oficejo de Kronach, ĉe kiu oni petu ankaŭ ĉiujn pliajn detalojn pri la aranĝo: Fremdenverkehrsamt, Esperanto, Postfach 510, D-8640 Kronach, FR Germanio. Estas pli ol certe, ke ĝuste tiu fakto – ke la Postkongreson aranĝas profesia turisma oficejo – promesas apartan kvaliton de la servoj kaj kompetentan priatenton de ĉiu unuopa gasto.



**La Gimnazio "Casimirianum", renesanca domo el 1601, en la urbeto Coburg (Koburk), kiu estos la celo de tuttaga ekskurso en la kadro de la Postkongreso.**



**Dum la Postkongreso oni aranĝos entute tri tuttagajn ekskursojn al la rava ĉirkaŭaĵo de Kronach. La dua el tiuj ekskursoj celos la urbon Bamberg, eble la plej faman inter la malgrandaj lokoj de Germanio. Ĝi estas konata sub la flataj nomoj de "frankonia Romo" kaj "miljara imperiestra urbo" kun majeste impona mezepoka ĉefplaco.**



# Pri po, -io kaj -ujo

DAŬRIGANTE sian pretigon de la 8a Oficiala Aldono al la *Universala Vortaro*, kaj de la *Baza Oficiala Radikaro*, kiujn mi esperas povi publikigi baldaŭ en la dua kajero de la "Aktoj de la Akademio", la Akademio jam voĉdonis pri du gravaj punktoj, kaj alvenis al decidoj jenaj:

1° La Akademio, post vastaj internaj diskutoj, malkonsilas la uzadon de la prepozicio *po* por esprimi la rilaton indikitan per la frakci-streko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj *en*, *je*, *por* aŭ *sur*, laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverbformon, kiel "30 kilometroj(n) hore".

2° La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la

sufikso *-io* por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso *-io* ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo; opinias, ke la okazo de la sufikso *-io* apud la fundamenta *-ujo* por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa uzado; kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

Vitry,

la 4an de febr. 1974

G. Waringhien

La Prezidanto de la Akademio

## Kiel fartas „Juna amiko”?

MULTAJ EL VI jam havas en la manoj la kompletan unuan jarkolekton de *Juna amiko*. Nun necesas retrorigardi kaj prezenti antaŭ nia tuta membraro, almenaŭ en ĉefaj trajtoj, la ĝisnunajn spertojn.

Permesu komenci per konfeso: Antaŭ kvin jaroj, kiam — post praktikaj konsideroj — la unuan fojon venis al mi la ideo reveki la internacian lernejan E-revuon, apenaŭ eblis fidi pri sukceso. Se ĝi tamen realiĝis, tion oni povas danki al la fakto, ke refoje evidentiĝis, ke nia publiko alte aprezas iniciatojn, kiuj celas nian junan generacion.

Anstataŭ longe babili, bv. rigardi la liston pri distribuado de *Juna amiko* n-ro 1. Jen ĝi estas:

Ludwig Pickel 500, Sovet-Unio 600, Nederlando 105, Usono 40, Bulgarujo 800, GDR 450, Ĉeĥoslovakio 250, Britujo 100, Portugalujo 40, Vjetnamio 50, Hungarujo 1120, aliaj landoj 55. Entute 4110 ekzempleroj.

Kaj tion ni atingis sen laŭta trumpetado. El la supra listo klare vidiĝas, ke plurajn landojn simple ne atingis nia voĉo (ekz. Pollando, Jugoslavio!). Pro tio, kvankam kontentaj pri la komenco, ni havas nun financajn zorgojn, ĉar per la eldonkvanto de 5000 ekzempleroj

S-ro G. Kurucz, la redaktoro de la revuo "Juna amiko": Pli efika subteno estas urĝe bezonata.



HEA povas kovri nur 75% de la efektivaj elspezoj. Aliflanke oni ne povas akcepti proponojn pri altigo de abonpago, nek tiun pri malaltigo de la tipografia nivelo. Restas al ni nur esperi, ke la revuo baldaŭ atingos la eldonkvanton de 7 000 ekzempleroj.

Mi, persone, konscias ke ankaŭ la redakta laboro havas mankojn. Ili rezultas ĉefe el tio, ke mi komencis la redaktadon sen anticipaj spertoj, kaj parte ili fontas el la izoliteco de nia kunlaborantaro.

Tamen, malgraŭ ĉiuj ĵus vicigitaj problemoj, ni alfrontas la novan lernojaron kun espero pri pluaj sukcesoj. Ni fidas, ke bonvolo kaj helpemo plue akompanos nian agadon, kaj ke ni ricevos multajn kritikojn kaj novajn abonojn el ĉiuj landoj de la mondo. Bonvolu rekonsideri la eblecojn subteni la revuon *Juna amiko*.

G. Kurucz



# Rezulto bonega, sed paradoksa

Recenzas Michel Duc Goninaz (Francujo):

*L'espéranto sans peine*, de Jean Thierry. Paris: Assimil, 1973. 9+420p. 18cm. Ilus.

La fama metodo Assimil ne bezonas prezenton: ĝi estas bone konata ne nur en Franclingvio, sed en multaj landoj. Al sia kolekto de lernindaj lingvoj Assimil ĵus aldonis Esperanton.

La principo estas la sama kiel por la aliaj lingvoj: cento da lecionoj sub formo de dialogoj, kun apuda traduko franclingva, gramatikaj klarigoj, ekzercoj. Ĉiu sepa leciono estas dediĉita al gramatika revizio. Du "ondoj": la unua por pasiva asimilo, la dua por aktiva posedo. La libron akompanas diskoj, magnetofonaj bendoj aŭ kasetoj.

Jean Thierry bonege solvis la problemon de adapto de Esperanto-instruado al la Assimil-ŝablono. Unu delikata problemo, la "loka etoso", estis solvita per vojaĝoj en diversaj landoj de kvar diversnaciaj protagonistoj. La dialogoj estas viglaj, interesaj, ofte humurplena. La temoj, tre variaj, donas okazon por ellerno de "fakaj" vortoj, kiuj en la nuna civilizacio iĝis ĉiutagaj, kaj kiuj tro ofte mankas al la ordinara esperantisto, katenita de la "fundamenta" vortprovizo de la elementaj lernolibroj, kaj fortimigita de la damnindaj neologismoj.

Tiu ĉi rimarko des pli validas por la frazeologio: la aŭtoro eluzis ne nur la pretajn dirmanierojn, tradiciigintajn en nia lingvo, sed la riĉegajn latentajn ŝuldatajn al la fleksebleco de Esperanto. Sur tiu vojo, li ne evitis kelkajn francismojn, kiaj: "La plantoj kaj mi!", "Tio estas agrabla ŝanĝo je la lentoj", "Ŝi estos tro kontenta doni al vi la recepton", "Eĉ hundon oni ne elpelus", "ok tagojn poste" k.s. Entute, la rezulto estas bonega, sed paradoksa. Se veras, ke lernolibro estas normiga, do devas liveri modelon, veras samtempe, ke lingvon oni devas prezenti tia, kia ĝi estas efektive parolata de ties uzantoj. Nu, kie (aŭ: kiom) estas

Evento por franclingvanoj: Post la sukceso kun la libro "Je parle espéranto", kiu aperis ĉe la komerca entrepreno Marabout Flash, Jean Thierry eldonigis sian novan verkon ĉe la fama eldonejo Assimil, specialigita ĝuste en la eldonado de prilingvaj lernolibroj.



la esperantistoj, kiuj sin esprimas tiel elegante kaj suko-plene, kiel la rolantoj elcerbumitaj de Jean Thierry? La Esperanto-Assimil donos certe al la neesperantistoj bonegan impreson pri la riĉeco kaj esprimiveco de nia lingvo, sed mi volonte rekomendus tiun lernolibron al la esperantistoj mem!

**Mendu ĉe UEA:** libro 19,- gld.; diskoj, sonbendoj aŭ kasetoj 211,20 gld. (por Nederlando resp. 19,75 kaj 245,- gld.) plus sendokostoj 10%.

## Ĉu indis traduki?

Recenzas C. Conterno Guglielminetti (Italujo):

*Rakontoj kaj poemoj*, de Ĝ. Ĥalil' Ĝibran'. Rio de Janeiro: Kultura kooperativo de esperantistoj, 1972. 150p. 21cm.

Krom foto, kiu diras tre malhele kaj tre malmulte, krom ilustraĵoj entute falsaj, kies aŭtoro ŝajnas konvinkita, ke arabo (libanano) estas io turka plus io hinda envolvita en fumo-spiraloj, nenio indikas al la leganto kiu estis Ĥalil' Ĝibran'. En la verko aperas malmultaj aludoj: unu dato, 1900, montras, ke li estis tiam proksimume 30-jara. Tio klarigas kion eĉ Mattos, en sia prudenta antaŭparolo, ŝajnas ne kompreni: kial la revantaj nelongaj eroj en la libro ondumas



inter neakcepto de la novnaskita industria civilizo kaj sopiro al la paŝtejoj, al la fontoj, al la nemoviĝemo de miljara civilizo: kontrasto inter kamentuboj kaj minaretoj, kie la riĉuloj estas riĉaj kaj feliĉaj, la mizeruloj mizeraj kaj malfeliĉaj, sen ia mezvojo.

La traduko ne indikas kiam temas pri poemoj, kaj kiam pri prozo, sed tio ne estas manko, ĉar la aspekto estas tiu de la versetoj de la Biblio, eĉ kun paŭsado de konceptoj kaj vortoj, kaj al tiu tono la leganto sin fadenu, se li volas kompreni ion el la verko, el ĝia ŝvebanta entenaĵo.

Restas demando, ĉu efektive tiu ĉi iom ekstertempa verketo indus tradukon kaj publikigon. La violkolora presado ne helpas respondi al ĝi.

**Mendu ĉe UEA:** 10,62 (por Nederlando 11,04) gld. plus sendokostoj 10%.

# Kritikinda principaro

**Recenzas Vilho Setälä (Finnlando):**

**Amuzaj dialogoj en Esperanto**, de Albert Lienhardt, Rotterdam: UEA, 1973. 141p. 22cm. Ilustrita.

Dialogoj estas sendube bona ekzerco por finintoj de elementa kurso. Pli amuzaj tamen estus skeĉoj, unu-aktaj scenoj, teatraĵetoj kaj — iom post iom — dramoj de konataj aŭtoroj. Ankaŭ ĉi tia materialo ja estas akceptebla por ekzercado en ĉiutaga lingvaĵo. Sed incita estas la pedagogia metodo de la libro. Jam la rekomendo ekzerci tradukadon en la nacian lingvon kaj reen — tiel oni neniam liberiĝas de la katenoj de sia gepatra lingvo. La tradukado estas arto per si mem, kaj nur por la majstroj de la lingvo.

La verkinto volas prezenti la lingvon simpla por faciligi al la uzantoj ĝian komprenon, kaj por tio li aplikas sian sistemon, publikigitan en *Esperanto* n-ro 764, p. 116-118. Ĝi konsistas el 12 paragrafoj, el kiuj ĉ. duono estas kritikindaj. Mi pritraktos tiujn:

4. Uzi participojn nur tiam, kiam nepre necese. — Per tio oni evitas la instruon de grava parto en la strukturo de Esperanto.

5. Eviti malklarajn kaj pezajn vortkunmetojn.

6. Uzi dividstrekon en duradikaj kaj pli ol duradikaj vortkunmetoj.

Aplikante ĉi tiujn regulojn kiel la verkinto tion faras, oni evitas la aplikadon de la strukturo de Esperanto en la maniero, kiel tio okazas en la tuta Esperanta literaturo. Ekz.: La aŭtoro ja skribas en la supre citita frazo divid-streko, pli-ol-du-radika, vort-kunmeto kaj malrekomendas ekz. allogaspekta. Studante la tutan libron oni trovas ekz. pri-zorgi, nov-tempa, prunte-doni, sen-dube, sen-prokraste, bon-ŝanco, sur-meti ktp.

tra la tuta libro. Estus tute alia afero, se oni ĉe la unua apero de la kunmetaĵo montrus ĝian analizon, kaj prefere tuj donus ekzemplojn de pluraj similaj. Estas ja esence grave en nia lingvo lerni tion, ke oftaj vortoj, kiel sur, sub, pri, nov, bon ktp. ripete kaj konstante aperas en kunmetaĵoj kaj sen streketo. Aliparte, se vi konas iom la psikologion de la lingvo, “verŝajna” signifas proksimume samon kiel “atendebla”, dum per la skribita formo “ver-ŝajna” kaj la ĝusta prononco de tio, kun iom da akcento sur “ver” oni donas la

7. Eviti elizion de la finaĵo -o en vortkunmetoj. Tio estas erara. Ĝi ne estas elizio. Kontraŭe, la uzo de -o meze de vortkunmeto estas pleonasmo, uzata nur por faciligi la prononcon. Sekvante ĉi tiun regulon de la aŭtoro oni produktas ĝuste tiajn pezajn vortkunmetojn, kiujn li volas eviti. Ekzemple en la recenzata libro: nazo-kataro, grupo-kunveno, mano-flegistino, gitaro-virtuozo, bano-ĉambro, tago-mezo. Kial forgesi la naturan metodon por malpezigi similajn kunmetaĵojn: grupa kunveno, alloge aspekta, pasaĝera elirejo? Sed la aŭtoro ja volas kondamni ankaŭ “infanaj desegnaĵoj”, ĉar tio povas signifi desegnaĵoj pri, por, de aŭ fare de infanoj — kvazaŭ la gvido de kunteksto estus senvalora en Esperanto.

9. Uzi la akuzativon nur tie, kie ĝi estas nepre necesa. Ekz. ne skribi “memoru tion”, “resti tri tagojn”, “kreditu min”, sed “memori pri”, “resti dum”, “kreditu al”, kaj li eĉ pretendas la uzon de akuzativo “anstataŭo de prepozicio”, dum la akuzativo laŭ mia kompreno estas la baza formo de esprimo. Ĉi tie necesas akcenti tion, ke se iu afero estas malfacila al kelkaj lernantoj (de kelkaj nacioj), oni kontraŭe donu kiel eble plej multe da ekzerco en tio. Tiamaniere, ekz. ĉar finnoj ne konas la literojn c, ĉ, ŝ, ĝ kaj la respondajn sonojn, ni konsideris necese verki (por *Esperanto-kurso*) apartajn ĉapitrojn kun kiel eble plej multaj de ili, po unu el ĉiu el ili. Tiamaniere tiuj sonoj estas instruitaj en la tekstopaĝoj 3-10 de la 44-paĝa fabelaro. Kion vi dirus, se anstataŭe ni evitus tra la tuta libro ĉi tiujn sonojn? Sed kial vi do evitas instrui la akuzativon?

11. Adopti ĉiam la sinsekvon “subjekto — verbo — komplemento” kaj ne skribi ekz. “Krokodilon manĝis tigro”. Ĉu vi do fakte ne komprenas, ke ĉi tio ne estas sence sama afero, kiel “Tigro manĝis krokodilon”?

Proksimume antaŭ unu jaro mi havis la okazon en universitata seminario de “ĝenerala lingvistiko” doni mallongan referaton pri lingvaj spritaĵoj en Esperanto, ĉefe apogante min al kelkaj verkoj de R. Schwartz. Vi eble ne povas imagi la reakcion de la gvidanto, profesoro Jarmo Anttila. Li nome kun vervo kaj akcento diris: Nun vi vidis, ke Esperanto estas lingvo en pli profunda senco de la vorto ol oni ĝenerale kredas. Jen vidu, ne estas necese penadi al plej eble simpla, “baza” Esperanto. Nia celo ne estas plimultiigi la eternajn komencantojn. Per daŭriga instruado ni celu al la posedo de perfekta lingvo Esperanto.

**Mendu ĉe UEA:** 4,50 (por Nederlando 4,68) gld. plus sendokostoj 10%.



# Ĝisdata terminaro

Recenzas John C. Wells (Londono):

**Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj**, de F. Munniksmas k.a. Deventer (Nederlando): Kluwer, 1974. 535p. 22cm. Bind.

Pli ol 2 500 klarigaj artikoloj, pli ol 500 paĝoj, terminoj en naŭ lingvoj, vasta uzebleco ankaŭ por neesperantistoj — ĉi tia terminaro estas modela. Per IKEV Munniksmas kaj liaj 18 kunlaborantoj, sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio, kreis gravan aldonon al nia faka literaturo.

Alfabeto ordigite laŭ la anglaj terminoj, la artikoloj prezentas klarigon en la angla kaj en Esperanto de la koncerna nocio; flanke spaliriĝas tradukoj en la lingvoj germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda. (El la ĉefaj lingvoj de la kapitalisma komercado mankas nur la japana.) Detalaj indeksoj ebligas aliron el ĉiu el la uzataj lingvoj.

La fako kovrita — angle 'business', sed Esperante 'komerca-ekonomika' — centriĝas al la kapitalisma negocado: bankado, borsado, diskontado, merkato. Surprize malmultan atenton ricevas produktado, vararo, personaro kaj laborfunkcioj; eĉ malpli la konsumanto.

La lingvaĵo, angla kaj Esperanta, estas senriproĉa. Apartan laŭdon meritas la angla kunlaboranto, A. Venture, kiu sukcesis el Esperanta originalo krei vere fluan kaj naturan anglan tradukon. La Esperantaj terminoj mem estas plejparte saĝe elektitaj: *laborstabiligo* (angle: decasualisation), *komisio-entrepreno* (A: subcontractor).

La aŭtoro multe ekspluatas la komunuzan vortostokon, ekzemple per figura sencovastigo ĉe *hamstri*, *heĝado*, *konverti* (transkalkuli), *kuranta*, *loto* (A: batch), *parcelo* (A: lot). La angla esprimo por *kavalerio* (vidu PIV) estas 'kite flying' (kajtado)! Ĉe hezitataj formoj mi notis *buĝeto*, *firmito*, kaj la paron *proponado kaj postulado* (do ne: *oferto kaj mendo*). Anstataŭ *subprodukto* mi preferus *kromprodukto* (A: by-product; subproduktado estus ja produktado nesufiĉa). Kaj *komputoro* havas nek la fontfidelon de *komputero* nek la derivitecon de *komputilo*.

En terminaroj oni ĉiam trovas interesajn neologismojn. El PIV ni jam konas *agenturo*, *anuitato*, *brutta*, *diporto* (A: backwardation!), *endosi* (anstataŭ unu senco de *ĝiri*), *fri*, *konsigni*, *opcio*, *personalo*, *skipo*, kaj plurajn aliajn; novaj estas *antikrezo* (fruktuzhipoteko), *dispaŝo* (averioreguligo), *ekonometrio*, *ekonomizi* (redukti elspezojn), *etalono*, *haŭso* (alta konjunkturo), *intrinseka*, *maĝori* (tro subskripcii, A: to stag), *presti* (plenumi agon kontraktitan). Apud *monopolo* ni trovas ankaŭ *duopolo*, *oligopolo*, kaj la spegulsencajn *monopsonio*, *duopsonio*, *oligopsonio*. Unuavide ŝokaj al anglalingvano estas *gudvilo*, *kloŝopo*, *oŭtsidero* (kaj pli konform-

us al angla kaj Esperanta fonetiko *aŭcajdero*). Ĉu la difino de *franĉizo* ne devus esti pli vasta ol nur la asekura senco? — do ankaŭ la rajto, donita de produktisto al distribuisto aŭ detalisto, vendi varojn de li produktitajn. Kaj *bagajo* (por pakaĵo<sup>2</sup>) estis mortnaskita antaŭ longe.

Mi bedaŭras la provon lanĉi novan sufikson *-atario*, por indiki la personon, nerektan objekton de verbo: *adresatario* (al kiu oni adresis ion), *cedatario* (al kiu oni cedis ion), *endosatario*, *konsignatario*, *legacatario*, ktp. Kial ne *aladresito*, *alcedito*, ktp.?

Interese estas vidi, ĝis kiu grado iu termino estas komuna al la naŭ lingvoj. Ekzemple, *vagabonda kapitalo* havas similan nomon en ĉiu lingvo escepte de la angla ('varma mono'); same *aĝio*, *direkcio*, *emisii*, *konjunkturo*, *konosamento*, *reklamacii*, *solidara* montras ĝuste la tiusenkan neinternaciecon de la angla. Aliflanke nur Esperanto kaj la sveda ne konas formon similan al 'absenteismo' (forestismo, malasiduismo); kaj ĝin ni povus, eble devus, enkonduki.

La mildaj riproĉoj, kiujn mi volus fari pri IKEV, fontas antaŭ ĉio el la fakto, ke, kvankam ĝi estis verkita en la Internacia Lingvo, tamen la angla determinas la alfabetan ordigon, kaj la anglalingva difino aperas en unua loko. Verŝajne pro tio la referencado estas nenecese komplika. Ekzemple, serĉante *bankruptcy* (bankroto), oni trovas ne difinon, nur tradukojn kaj resendon al *(to) go bankrupt*; sed tie, sub G, estas nenio krom plua resendo al *(to) fail*. Simile *gold standard* (or-etalo) resendas al *monometallism*, kiu siavice resendas al *single standard*. Pluraj difinoj kovras 'semantikan kampon' adekvatan al la Esperanta (kaj supozeble nederlanda) termino, sed tro malvasta por la angla termino: tiel *certificate/laboratesto* (sed ankaŭ atestilo ĝenerale), *depreciation/deprecado* (de valuto; sed ankaŭ tio, kion UEA nomas 'deprezoj'), *to expire/maturiĝi*, *pagendiĝi* (sed ankaŭ eksvalidiĝi, finiĝi), *trade/profesio* (sed ankaŭ komercado!). Tio devas redukti la valoron de la vortaro por tiu, kiu serĉas la signifon aŭ tradukon de angla vorto. Plej grave: se la angla estus ne nur ŝajne sed ankaŭ efektive la originala lingvo, oni ne trovus la frapantan mankon de kelkaj gravaj terminoj: allowance, bad debt, building society, businessman, cash flow, equity, executive, fee, finance company, gearing, manager (!), overtime ban, shop steward, terms of trade, unit trust. Mi ankoraŭ serĉas esperantigon de *fork-lift truck* (veturilo por levi kaj staki 'paledizitajn' varojn: eble ni diru *forkoĉaro*). Sed por amaso da nocioj el la komerca kampo ni nun, dank'al IKEV, disponas ĝisdatan kaj fidindan terminaron.

**Mendu ĉe UEA:** 57,50 (por Nederlando 59,80) gld. plus sendokostoj 10%.



# 120 anekdotoj

**Recenzas Vilmos Benczik (Hungarujo):**

**Bonhumora injektilo**, 120 spritaj dialogoj kaj amuzaj anekdotoj, de Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: la aŭtoro, 1973. 187p. 18cm.

La kolekto prezentas cent dudek amuzajn anekdotojn en bona Esperanto. Certe ne ĉiuj pecoj estas same spritaj, sed, kiel sciante, la humuro estas esence “loka varo”, do plene kontentigi internacian legantaron estas ekstreme malfacila tasko. Pro tio povas okazi, ke anekdotoj, pri kiuj mi ridis vere bonhumore, por alilandano ŝajnos palaj, kaj kiujn mi mem trovis tiaj, lin ridigos ĝislarme.

Gravaj virtoj de la libro estas ĝiaj facilflua stilo kaj fundamenta vortaro, kiuj destinas ĝin por uzo en progresaj kaj eble eĉ en porkomencantaj kursoj. La ofseta preso estas ĝenerale bona kaj la libreto impresas bone ankaŭ teknike, sole ĝia prezo estas konsterna: mi dubas, ke multaj pretos elspezi tiom por aĉeti ĝin.

**Mendu ĉe UEA:** 12,72 (por Nederlando 13,23) gld. plus sendokostoj 10%.

## Maŭ pri „nova kulturo”

**Recenzas Ulrich Lins (FR Germanujo):**

**Elektitaj verkoj (Volumo II)**, de Maŭ Zedong. Pekino: Fremdlingva eldonejo, 1973. 456p. 23cm.

La volumo entenas artikolojn verkitajn de Maŭ inter 1937 kaj 1941 dum la kontraŭjapana rezistmilito, i.a. “Pri longdaŭra milito”, “La ĉina revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio” kaj “Pri nova demokratio”. La traduko, lingve elstara, baziĝas sur la ĉinlingva eldono de 1952, kies teksto kelkrilate diferencas de la originala versio. Ĉar la diverĝoj ne estas prinotitaj de la redaktoroj, la leganto, kiu deziras informiĝi pri modifoj en la teksto kaj tiamaniere studi la penso-evoluon de Maŭ, estas devigita konsulti alilingvajn kompilaĵojn de liaj verkoj, eldonitajn ekster Ĉinujo.

Pri la enhavo ni limigu nin nur al unu observo. Parolante pri la “ĉina nov-demokratia kulturo”, Maŭ asertas, ke ĝi “ligiĝas kun la socialismaj kaj nov-demokratiaj kulturoj de ĉiuj aliaj nacioj, kaj ili starigas rilaton de reciproka sorbado kaj reciproka akcelado al disvolvigo, formante kune novan mondan kulturon” (p. 368). Per tio Maŭ ŝajne celas aludi la ekziston de unueca, memstara “kontraŭimperiisma” mondkulturo, ne simple konsistigata de naciaj kulturoj. Dum probable Maŭ konsideras jam ekzistanta tian mondkultu-

ron, kies formiĝon Lenin antaŭvidis nur por la fora estonteco, li tamen apenaŭ klarigas al ni ĝian karakteron nek donas ekz. imagon pri lingvo, per kiu ĝi esprimiĝus. Kontraŭe, sin altrudas la impresoj, ke Maŭ emas nomi “monda kulturo” tion, kion la ĉina nacio juĝas transpreninda; li perceptas ĝin kiel inspiranton kaj aliancanon de la ĉina nacio. La fremdan progreseman kulturon Maŭ komparas kun tiu utila parto de manĝaĵo, kiun la ĉina nacio decidu asimili, post kiam la malutila ekskremento — feŭdismo, imperiismo, superstiĉo — estas ekskreciita. El tiu implicita identigo de tutmonda kontraŭimperiisma kulturo de la popolamasoj kun la “nova kulturo de la ĉina nacio”, estas deduktebla la pretendo de Maŭ, ke Ĉinujo kreu universale signifan modelon kaj plenumu avangardan rolon en la plua evoluo de supernacia progresema kulturo.

**Mendu ĉe UEA:** 9,— (por Nederlando 9,36) gld. plus sendokostoj 10%.



**Clave de Esperanto** (dua eld., 1973) A. Gómez Cruz. 14+45+47 p. 21cm. Broŝ. 2,70 gld. Malgraŭ la titolo la libro estas du-direkta oportuna vortareto kun tre konciza prezento de la gramatiko. Ĉi tiu eldono ne enhavas la reform-proponojn, kiuj aperis en la unua.

**En la nubon ŝi sorbiĝis for!** (1973) 62p. 19cm. Broŝ. 3,60 gld. Pri la faligo de atombombo sur Nagasaki en 1945 kaj ties sekvoj; la libro celas infanojn en lernejo.

**Esperanto 1** (2a eld., 1973) L.K. Hunnes. 93p. 21cm. Broŝ. 9,90 gld. Norveglingva kurso laŭ gramatika metodo.

**L'Espéranto sans peine** (1974) J. Thierry. Libro 420p. 19cm. Bind. 19,— gld., kun aŭ 16 diskoj 17cm. 33 t/m aŭ 4 sonbendoj aŭ kasetoj 211,20 gld. 98-leciona kurso laŭ la konata metodo “Assimil” por franclingvanoj.

**Kalejdoskopio Varieteo** (1974) E. de Bonaero. 160p. 18cm. Broŝ. 9,— gld. Kolekto de mallongaj eseoj, recenzoj, poemoj kaj humuraĵoj, originalaj kaj tradukitaj el diversaj lingvoj.

**Konttinen, Profetino Helena (1871-1916)** K.K. Sarlin (1871-1957). El la finna koncizige tradukis L. Hanhiniemi (1974). 72p. 19cm. Broŝ. 1,80 gld. La vivo, vizioj kaj faroj de finna profetino.

**Kristnasko-kanto de la bonaj infanetoj** (1974) Muziko de Virk, teksto de J. Rioseco, trad. H. Ferez. Kantofolio sen akompano. Por solkanto 0,90 gld. Ĥora aranĝo SATB 1,20 gld.

**Literaturo en japana Esperanto-movado (1946-1972)** (1973) N. Asahiga kaj Y. Mine. 16p. 21cm. Broŝ. 1,80 gld. Ĉi tiu dua bibliografia kajero registras 392 esperantaĵojn kaj tradukojn el Esperanto, verkitajn kaj/aŭ eldonitajn en Japanujo.

**Niaj plej grandaj verkistoj** (1974) E. de Bonaero; **Ekflorado ĉe Plata-rivero** (1968) F. Ken. 112p. 17cm. Broŝ. 7,50 gld. La unua verko estas literatura gvidilo kun ekzemploj, celanta ĉefe la izolitan esperantiston; la dua priskribas la agadon de diversaj argentinaj kaj urugvajaj esperantistoj, denove kun literaturaj ekzemploj.

**Tornistro, La; n-ro 2** (1974) Red. E. de Bonaero. 48p. Ilus. 21cm. 5,— gld. Nova miksa sortimento laŭ la maniero de la unua numero.

**Ĉiujn mendojn adresu al:** Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.



# Debato kun junaj eŭropanoj

LAŬ LA ĴUS APERINTA nova numero de *TEJO-Novajoj*, ie en la norda Francujo (oni forgesis indiki la nomon de la loko), fine de marto okazis vigla debato pri la temo "Esperanto, kial?". Temis pri invito de unu el la tieaj Klubo de Junaj Eŭropanoj, al kiu reagis cento da gejunuloj. En pluraj kontribuoj al la temo oni akcentis, ke la oficialaj instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo apenaŭ aŭ tute ne dediĉas sian atenton al la lingva problemo en la kunlaboro de la naŭ landoj-membroj. Samtiel oni emfazis la mankon de taŭgaj materialoj por studi la problemon. Ĝeneralaj konkludoj de la debato estis favoraj al la Internacia Lingvo, kiun subtenis ankaŭ la ĉeestantoj, neparolantaj la lingvon. La kunvenon akompanis malgranda sed sukcesa ekspozicio pri Esperanto, kiun prizorgis la ĝenerala sekretario de TEJO f-ino Renée Triolle. Oni distribuis ankaŭ multajn broŝurojn de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, en kiuj oni traktas la lingvan kaj kulturan imperiismon.


## Nova subvencio al TEJO

LA EŬROPA JUNULARA FONDAĴO el Strasburgo ankaŭ ĉi-jare subvencios la agadon de la junulara sekcio de UEA. En sia kunsido okazinta la 1-an kaj la 2-an de aprilo, la Estraro de la Fondaĵo asignis al TEJO por la jaro 1974 subvencion de 17 000 francaj frankoj (ĉ. 9 200 guldenoj). Pasintjare la sama Fondaĵo subvenciis la agadon de TEJO per iom malpli granda, sed konsiderinda monsumo. Ĉi-jare el la sama Fondaĵo oni asignis monhelpon al 25 neregistraj junularaj organizaĵoj.

## TEJO en soveta gvidlibro

EN LA GVIDLIBRO *Eksterlandaj junularaj organizaĵoj*, kiu antaŭ nelonge aperis en Moskvo, kaj kiu sur pli ol 360 paĝoj al la sovetaĵ junularaj aktivuloj prezentas plurajn centojn da junularaj organizaĵoj en pli ol 100 landoj kaj plurdekon da internaciaj junula-

raj organizaĵoj, — aperas ankaŭ TEJO. Al la junulara sekcio de UEA estas dediĉita tuta paĝo, sur kiu oni listigas faktojn pri la historio kaj nuna konsisto de la organizaĵo. Estas akcentite, ke TEJO estas "vasta internacia junulara unuiĝo, kiun konsistigas junaj homoj sendepende de iliaj politikaj, religiaj, rasaj aŭ sociaj apartenoj, uzantaj la helplingvon Esperanto cele al internaciaj kontaktoj". La gvidlibro aperis en 70 000 ekzempleroj kaj ĝi sendube havos bonan informan efikon.



KER  
en  
Mün-  
ster

LA KOMISIONO por Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER), sendube jam dum pluraj jaroj la plej aktiva parto de la junulara sekcio de UEA, havas ambiciajn planojn ankaŭ por la ĉi-jara somero. Kiel ni jam anoncis en ĉi tiu revuo, KER kombinis sian plej grandan ĉi-someran aranĝon kun la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO, okazonta inter la 3a kaj la 10a de aŭgusto en Münster, FR Germanujo. Temas pri la seminario "Lingvo kaj socio", kiu okazos paralele kun la 30a IJK. La seminario estas planita tiel, ke ĝi daŭrigu la traktadon de la temoj pri kiuj okupiĝis ankaŭ la lastvintra aranĝo de KER en Zierenberg (v. la februaran numeron de nia revuo, p.30). La programo de la seminario en Münster koncentrigos siajn prelegojn kaj diskutojn je du aspektoj de la rilatoj inter la lingvo kaj la socio: 1) Kiaj estas la rilatoj inter la lingvo kaj la ekonomio, t.e. kiamaniere ekonomia dominado estas subtenata de la fakto, ke la dominata regiono uzas la nacian lingvon de granda potenco (plej ofte antaŭa kolonia metropolo)? 2) Ĉu entute, kaj se jes — kiuj politikaj sistemoj povus certigi justan rilaton inter nacioj kaj sekuran pozicion de la minoritatoj?

Kiel kutime, KER ne planis ĉi tiun seminarion nur por la membroj de la junulara Esperanto-movado, sed al la aranĝo estas invititaj pluraj neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Inter la prelegontoj en la seminario troviĝas ankaŭ prof. Jan Knappert, konata lingvisto el Londono.



## Argentino

■ En la loka kultura centro de Salta ĵus finiĝis kurso de la Internacia Lingvo, kiun dum tuta jaro gvidis s-ro Jorge Juan Wuest, lingvo-instruisto ĉe la loka universitato. Ankoraŭ funkcias progresiga kurso ĉe la sama centro. Tre baldaŭ s-ro Wuest translokiĝos por instrui ĉe la Universitato de la urbo Pasto en Kolombio, kaj li planas ankaŭ tie okupiĝi pri la instruado de la Internacia Lingvo.

## Aŭstrujo

■ D-ro Klaus Perko el Graz, kiu estas estrarano de la Aŭstria Ligo por Homaj Rajtoj, aperigis en ties monata revuo *Das Menschenrecht* (marto 1974) tradukon de la kompleta raporto pri la Dua Ĝenerala Kunveno en la 58a UK en Beograd, el la septembra numero de nia revuo. Temas pri la kunveno, kiu traktis la temon "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko".



## Britujo


■ Dum la 58a Brita Kongreso de Esperanto, kiu okazis inter la 12a kaj la 15a de aprilo en Sheffield, en la urbocentro estis inaŭgurita Esperanto-strato. Sur la foto (dekstre) estas la urbestro L.Cope, apud la prezidanto de BEA G.Leon-Smith kaj (maldekstre) Jo Haazen el Antverpeno, kiu festparolis dum la Kongreso. (Foto: P.Oliver).

## FR Germanujo

■ Minimume 500 personoj, precipe instruistoj kaj gimnazianoj, vizitis la ekspozicion pri "Lingvaj minoritatoj en Eŭropo", kiun en Eschweiler (apud Akeno) organizis la germana filio de la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj. La ekspozicio okazis meze de marto ĉi-jare, kaj ĝiaj materialoj estas facile uzeblaj aliloke: en la germanlingvaj teritorioj eblas senŝanĝa uzo, dum en alilingvaj medioj necesas tradukoj. (Vidu la apudan foton).

## Finnlando

■ La Universitato de Turku pozitive reagis al petskribo de la lokaj esperantistoj kaj decidis inkluzivigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la programon de la Fakultato de Humanismaj Studoj.



## Hungarujo

■ Post la sukcesoj, kiujn atingis la "Scienca Rondo" en la budapeŝta Esperanto-grupo "Konkordo" (pri kio ni raportas aliloke en ĉi tiu numero), antaŭ nelonge en la sama klubo fondiĝis ankaŭ "Beletra Rondo". En la monataj programoj de "Konkordo" estas rezervitaj po du vesperoj por la membroj de la nova sekcio.

## Koreujo

■ Sekve de sukcesa monkolekta kampanjo, kiu alportis la egalvaloron de ĉ. 4 250 usonaj dolaroj, la landaj sekcioj de UEA kaj TEJO en Koreujo nun havas propran oficejon en la centro de Seoul. Volante krei ankaŭ bibliotekon, la membroj de la du organizaĵoj jam inter si kolektis plurajn centojn da Esperantaj libroj. Ili bonvenigos ankaŭ vian donacon tiucele, kiun oni povas adresi al: I.P.O. 1232, Seoul 10, Koreujo.

■ Antaŭ kelka tempo aperis preskaŭ 200-paĝa *Perfektiga Kurso de Esperanto* ĉe la konata eldonejo Bomhak-Guan. La libron verkis juna aktivulo de la Korea Esperanto-Societo s-ro Ĵeong Ĵong-Hju, studento pri juro ĉe la Nacia Universitato de Koreujo.

## Usono

■ Kiam oni pasintjare, post ekspozicio de libroj en trideko da lingvoj, atentigis oficialulojn de la monde konata Bostona Publika Biblioteko, ke ĝi devus inkluzivigi en sian programon ankaŭ eldonaĵojn en la Internacia Lingvo, neniu kredis pri baldaŭa pozitiva reago. Tamen, la Biblioteko




jam faris tion kaj nun havas Esperanto-fakon kun plurdeko da titoloj kaj planoj pri novaj investoj tiucele.

### Zairo


■ Kelkaj entuziasmoj klopodas revigligi la Movadon en Zairo kaj tiucele refondis Esperanto-Instituton, kiu jam eldonis la unuan numeron

de sia informilo *Zaira Esperanto-Bulteno*. Ĝi alvokas subteni la tiean agadon per donaco de lernolibroj kaj vortaroj (prefere franclingvaj), kiujn oni povas adresi al: s-ro K. Braët, B.P. 5155, Kinshasa 10. Bonvenus ankaŭ monhelpo, ĉu rekte al la Instituto, ĉu pere de la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe UEA.



### Traduka beletro

■ Probal Daŝgupto, talenta hinda studento pri lingvistiko (magistra grado), jam plurajn jarojn okupiĝas pri poemvolumo de la fama Robindronath Thakur, kiun li tradukas el la



bengala originalo en Esperanton. Verŝajne en ligo kun la finredakto de la manuskripto, Daŝgupto (maldekstre sur la foto) antaŭ kelka tempo restadis en la Universitato de Ŝantiniketon (apud Kalkuto) kaj vizitis la bengalan E-pioniron L. Ŝingho (Sinha, dekstre sur la foto), kiu en la Internacian Lingvon tradukis la novelaron de Thakur *Malsata ŝtono*.

### Radio-kurso

■ Post dujaraj klopodoj, la brita "Grupo Kvin: Esperanto en la Radio kaj Televido" pretigis tute novan radio-kurson de la Internacia Lingvo kaj transdonis ĝin al la Universitata Radio Essex, okaze de la 58a Brita Kongreso de Esperanto (Sheffield, 12a – 15a de aprilo). Oni planas la komencon de la kurs-elsendoj por majo ĉi-jare.

### Junularo

■ *Starto*, organo de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, organizis konkurson inter siaj junaj legantoj. La temo de la artikol-konkurso estis "Kiel vigligi la intereson kaj agemon de la junularo en la ĉeĥa Esperanto-movado?".

### Universitatoj

■ Sub la gvido de d-ro H.M. Maitzen, en la Universitato de Bochum (FR Germanujo), inter la 8-a kaj 11-a de aprilo okazis la dua intensa lingvolaboratoria kurso de la Internacia Lingvo. Inter la gekursanoj troviĝis ankaŭ la edzino de prof. Augusto Ochoa el Kolombio, kiu restadis studcele en Eŭropo kaj mem delonge estas parolanto de la Internacia Lingvo. Prof. Ochoa estis tiel entuziasma pri la nova lingvolaboratoria instrumaterialo de Hermann Behrmann, ke li deklaris sian pretecon apliki la instrumentodon ankaŭ en Kolombio. Tio ĉi estis nur unu plia aranĝo en tuta aro da similaj kursoj lastatempe.



### Harry

■ La aŭstralia ambasadoro en Bonn, s-ro Ralph Harry, ne ĉeestos la 59an UK en Hamburgo, ĉar li estas nomita kiel estro de la aŭstralia delegacio en la internacia konferenco pri la mara juro, kiu okazos dum julio kaj aŭgusto en la ĉefurbo de Venezuelo. Ni eksciis, ke la ambasadoro Harry, antaŭ ol forveturi al Latinameriko planas akcepton por diplomatoj en sia rezidejo en Bonn, dum kiu la prezidanto de UEA invitos la diplomatojn ĉeesti la Solenan Inaŭguron de la 59a UK.

### Aisberg

■ Ing. Eŭgeno Aisberg, la fama verkinto de la popularscienca libro *Mi komprenas fine la radion!*, kies originalo estis verkita en la Internacia Lingvo preskaŭ antaŭ duona jarcento kaj tradukita en 22 naciajn lingvojn, antaŭ kelka tempo verkis plurajn

### Sporto


■ En pluraj nacilingvaj kaj Esperantaj periodaĵoj aperis ofte kontraŭdiraj informoj, kiujn ŝajne lanĉis la pariza semajna magazino *L'Express*, kaj laŭ kiuj la fama muzika ensemblo "The Beatles" aperos en julio ĉi-jare ensenpaga koncerto en Montrealo (Kanado) kaj kantos "por subteni Esperanton kaj sporton". Oni mencias dekon da milionoj da dolaroj, kiujn la ensemblo enspezus de la aŭtoraj rajtoj por tiu koncerto, kaj utiligus por subvencii ĉiun sportiston en la Olimpikoj de 1976, aparte kaj pli malavare tiujn, kiuj "deklaras sian pretecon" lerni la Internacian Lingvon. Ĉi tiu "novaĵo" estas des pli miriga se oni scias, ke la fama ensemblo jam dum pluraj jaroj ne plu ekzistas kiel unueca muzika grupo.

### Filmo

■ Aŭstralio denove produktas koloran informan filmon en la Internacia Lingvo. Temas pri la filmo *La Kvina Fasado*, kiu en 15 minutoj (16mm) prezentos la novan operdomon en Sidnejo. Krome, nun oni presas ankaŭ la Esperantan eldonon de la informa broŝuro *Aŭstralio – Koncizaj Faktoj*.



artikolojn pri la 50a datreveno de la radio-elsendoj. En ĉiuj ĉi artikoloj Aisberg, kiu nun estas prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Radio-Teknika kaj Elektronika Preso, atentigas pri la akriĝanta lingva problemo en la hodiaŭa mondo kaj mencias Esperanton kiel taŭgan kaj necesan solvon.



E. Aisberg: Duonjarcenta aktiveco.





# Kongresa Komunikilo

## 59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 – 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo.

### Malpli kostaj hotelĉambroj haveblaj!


La prezoj de unulitaj hotelĉambroj, indikitaj sur la oficiala ĉambromendilo, kiun ĉiu kongresano ricevas kun la Oficiala Bulteno, komenciĝas je 25,— germanaj markoj por ĉiu nokto en la plej malalta kategorio C. Nun tamen, LKK atingis, ke la Urba Turisma Oficejo, kiu peras la hotelmendojn, peru ankaŭ malpli kostajn ĉambrojn en pensionoj kaj malgrandaj hoteloj, je prezo de maksimume po 23,50 g.m. por ĉiu nokto. La kongresanoj, kiuj deziras profiti tiun novan eblecon, povas uzi la saman ĉambromendilon, nur aldonante post la indiko pri prezo-klaso la vortojn: “ĝis 23,50 g.m.”. Tiu prezo inkluzivas la matenmanĝon kaj la servmonon.

### Hotelmendoj — nur al la Turisma Oficejo!

Montriĝis, ke kelkaj kongresanoj malatentas la instrukciojn sur la ĉambromendilo dissendita kun la Oficiala Bulteno, sendante la mendilon al la adreso de LKK anstataŭ al tiu de la Urba Turisma Oficejo (Fremdenverkehrszentrale). Ĉiuj mendantoj bonvolu bone atenti ke la ĉambromendilo estu sendita nur al la adreso de Fremdenverkehrszentrale presita en kadro sur la mendilo. Sendo al alia adreso povas kaŭzi nur prokraston de la traktado de la mendo.

### Ampleksa programo de ISU fiksita

En sia kunsido de aprilo 1974 la Estraro de UEA akceptis nekutime ampleksan programon por la 27a Sesio de la Internacia Somera Universitato, okazonta en la kadro de la Universala Kongreso en Hamburgo. Prelegos profesoroj: H.Ebinger (FR Germanujo — rektoro de la Sesio), M.Isaev (Soveta Unio), S.Kawamura (Japanujo), K.Kordylewski (Pollando), I.Lapenna (Britujo), P.Neergaard (Danlando), O.Pancer (Jugoslavio), V.Peevski (Bulgarujo), J.Régulo Pérez (Hispanujo), C.Støp-Bowitz (Norvegujo) kaj G.Waringhien (Francujo) — entute 11 profesoroj el 11 landoj. La temoj varias de lingvistiko ĝis astronomio, de juro ĝis ornitologio. Plurajn prelegojn ilustras lumbildoj, filmoj aŭ sonregistraĵoj.



La 59a UK okazos en tre konvenaj, modernaj ejoj de la Kongresa Centro: Ĉi tie — la Festa Salono.

### Infanoj serĉataj!

La 14a Internacia Infana Kongreseto ĝuos tre bonajn kondiĉojn kaj altnivelan gvidadon. Tamen ĝi ankoraŭ povas akcepti multe pli da junaj kongresanoj (ĝis la aĝo de 13 jaroj). Interesitoj povas ricevi specialan aliĝilon ĉe la konstanta adreso de la UK aŭ ĉe la adreso de la Infana Kongreseto: S-ino Elfriede Blasius, D-2 Hamburg 70, Grenzknick 7, FRG.

### Akcento je la landaj kaj fakaj asocioj

Krom la ĉefa temo de la Kongreso — “Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo” — elstaras en la kongresa programo la aparta atento dediĉota al la laboro de la landaj kaj fakaj Esperanto-asocioj. La Unua Ĝenerala Kunveno pritraktos, krom la Raporto de la Estraro de UEA, la temon “Plifortigo de la landaj asocioj”. La Debato havos la titolon “Landaj revuoj en Esperanto — Ĉu utilaj?”. Aparta kunsido de respondeculoj de la landaj asocioj diskutos “Kion fari kontraŭ perdo de membroj?”. Kaj, krom la multnombraj unuopaj kunsidoj de fakaj organizaĵoj, simila kontakt-kunsido de iliaj respondeculoj interŝanĝos vidpunktojn pri komunaj problemoj.

### Turismaj eldonadoj aperos en Esperanto

Okaze de la Kongreso la informejo “Hamburg-Information” eldonos en Esperanto sian grandformatan, gazet-similan prospekton pri Hamburgo kun urba mapo. Informan kajeron en Esperanto pri Hamburgo krome disponigos la Ŝtata Gazetara Servo.



## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1974

BAĤREJNO: D. Birkett. BRAZ: D. Pereira de Souza. BRIT: W.G. Atkinson, S.E. Bellatti, E.B. Knight, H.D. Palmer, R. Seddon, K.A. Sly, D.H. Withey. DAN: B. Zacho. FR GER: L. Bechtold, E. Eggers, T. Kraft, H. Schütt, H. Wagner. NED: P.K. de Jong.

## NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-07-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

BRAZ: Luiz Teixeira da Silva, D Lavras. FRG: Hermann Schmid, D kaj FD Augsburg, Alfred Wollbacher, FD Neuses üb Kronach. HISP: Jesús Perez Caballero, VD Las Palmas de

Gran Canaria. JAP: Ivao Katoo, VD kaj FD Kanazawa. JUG: Jozo Marević, FD Zagreb. URUGV: Rodolfo García López, FD Montevideo.

## NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto, baldaŭ aperonta.

BRIT: Burnley. Centr-Afrika Resp.: Bangui. FRG: Bremen, D. JUGOSL: Ilirska Bistrica; Novska; Split, JD kaj FD (turismo): Varaždin, FD (presa-do). NED: Amsterdam, (FD komerco: libroj).

## DONACOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo W. Steffering (aldono) 56,95. Sumo ĝisnuna 1110,72

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: E. Burg 2,50; F. Zeiler 40,—. Sve-

dujo: D. Sandström 20,—. Sumo ĝisnuna 236,07.

ĜENERALA KASO: Britujo: H. Davies 26,30. FRG: Germana E-Asocio 10,48. Nederlando: R. Moerbeek 50,—. Svedujo: Delarnes Esperanto-Distrikto 180,—; E-Klubo de Falun 180,—; O. Olsson 100,—. Sumo ĝisnuna 830,17.

PATRONAJ MEMBROJ A DE TEJO 1974: 17. R. Corsetti, Italujo. 18. J. Derks, Monako.

PATRONAJ MEMBROJ B DE TEJO 1974: 3. J. Carlsson, Svedujo. 4. E. Ockey, Britujo.

## GRANDA DONACO AL CED PRO LA APRILA "ESPERANTO"

S-ro Walter Kaukal, dumviva membro de UEA en Neustadt/Weinstr. (FR Germanujo), sendis al la Centra Oficejo la sumon de 400 germanaj markoj kiel donacon por CED kun eksplicita motivo: "apoge al ideoj de la prezidanto en la aprila *Esperanto* kaj por kuraĝigi lian pluan gvidadon de UEA kaj de CED".

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

# Kalendaro

## Junio

- 01-02 3a E-Kongreso de GDR, Berlino
- 01-03 68a Sveda Esperanto-Kongreso, Borlänge
- 01-03 SAT-Junulara Konferenco, Nemours, Franc.
- 20 Limdato por aliĝo al la Universala Kongreso
- 21-23 22a Kongreso de ELNA, Spokane, WA, Usono
- 21-23 25a Hungara E-Kongreso, Szolnok
- 24-27 Hungara Postkongreso, Szolnok
- 28-30 16a Kanada Kongr. de Esp., Ottawa

## Julio

- 01-21 Kulturaj Esperantistaj Semajnoj, Grésillon, F.
- 06-07 Fervojista E-Renkontiĝo, Szombathely, Hun.
- 06-14 Internacia E-Tendaro, Vääsby, Finnlando
- 07-13 12a Somera E-Universitato, Gyula, Hungar.
- 07-21 Somera Lernejo, Dudince, Ĉeĥoslovakujo
- 10-20 7a Pionira Internacia Tendumado, Sikonda, Hungarujo
- 15-24 7a Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj, Abaliget, Hungarujo
- 16-20 Seminario "Balta Maro — Maro de Paco", Gdańsk, Pollando
- 17-26 ILEI-Konferenco, Sonnenberg, FRG
- 18-21 Brazila E-Seminario, Fortaleza (Ceará)
- 18-22 34a Hispana E-Kongreso, Valladolid
- 20-27 3a Kongreso de Kristanaj Esperantistoj, Hamburg, FR Germanujo

- 20-27 E-Festivalo, Banská Bystrica, Ĉeĥoslovakujo
- 21-27 Internaciaj FERIAJ Kursoj, Helsingør, Danlan.
- 22-11/8 Internaciaj Semajnoj, Grésillon, Francujo
- 27-03/8 59a Universala E-Kongreso, Hamburg, FRG

## Aŭgusto

- 03-08 3a Ornitologia Semajnduono de ORE, Westerland-Sylt, FR Germanujo
- 03-09 47a Kongreso de SAT, Bergamo, Italujo
- 03-10 30 Internacia Junulara Konferenco de TEJO, Münster, FR Germanujo
- 04-11 Oficiala Postkongreso, Kronach, FR Germ.
- 04-14 Internacia Turista Renkontiĝo, Szeged, Hung.
- 04-25 Someraj Universitataj Kursoj, Dua Sesio, Liège, Belgujo
- 05-12 E-Vegetarana Kongreso, Dudince, Ĉeĥoslov.
- 10-17 Somera E-Kurso, Barlaston, Britujo
- 12-02/9 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 17-31 Esperantista Grupvojaĝo tra Albanujo
- 19-24 Varia Internacia E-Semajno, Budapeŝto, Hun.

## Septembro

- 05-18 Ora Pola Aŭtuno, Miedzygórze, Pollando
- 06-08 5a Jubilea Renkontiĝo de E-Filatelistoj, Opava, Ĉeĥoslovakujo
- 06-08 Amika Renkontiĝo, Dudince, Ĉeĥoslovakujo
- 07-08 16a Kataluna E-Renkontiĝo, Cervera, Hisp.
- 14-19 45a Itala Esperanto-Kongreso, Verona
- 14-25 Ora E-Feriado, Pamporovo, Bulgarujo
- 18-28 Ĉebalta Kultura Seminario, Kadyny, Pollan.
- 21-22 7a Kultura E-Semajnfino, Renens, Svislando
- 22-28 15a Eŭropa Feriosemajno, Magliaso, Svislan.



*Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.*

**UNIVOX-kursoj en Esperanto** sur diskoj, sonbendoj 9,5 cm. aŭ kasetoj kun paralelaj tekstolibroj en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj. Petu novan informilon kun prezolisto, indiko de pagmanieroj ktp. INTER – Agadgrupo por Esperanto, Box 550-28, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

**Kutimiĝu al internacia parolmaniero** per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj programoj.

**Edziĝcele dez. korespondi** (Esperanto, angla, germana) 35-jara flugkompania oficisto Mehmet Telyakar, Aydınlık sok no.23, Ortaköy, İstanbul, Turkujo.

**Oficialaj vortoj.** Presita listo denove aĉetebla kontraŭ 3 int.rkp. de Edward Ockey, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey, SM7 3PU, Anglujo. Ĉiuj vortoj el Universala Vortaro kaj Oficialaj Aldonoj alfabete ordigitaj en 24-paĝa kajero kun ĉiuj anglalingvaj tradukoj rekomenditaj de la Akademio. Esenca konsultilo por vera esperantisto.

**Filatelistoj!** UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trionoj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

**Danlando-Svedio-Germanio!** Jen nova INTER-aranĝo 1974. Vizitoj en la dana urbo Aalborg kaj en la sveda Gotenburgo. Unue kvin ĉarmaj tagoj en Skandinavio. Ŝipveturoj, ekskursoj al fjordoj, valoraj prelegoj kaj Esperanto-turismo en agrabla, amikeca stilo kun praktikado de nia lingvo en gaja rondo. Due komuna ŝipveturo al Hamburgo kaj 59a (kun komfortaj hoteloj). Vi povas partopreni ambaŭ partojn de la INTER-aranĝo aŭ, se vi preferas, nur elekti unu el ili. Prezoj tre favoraj (ĉiu atingebla rabato dispone al la partoprenantoj). Petu informojn: INTER – Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

**Amase sendu** skribajn salutojn al la pentekosta renkontiĝo de Germana kaj Nederlanda Esperanto-Junularoj por komencantoj kaj “infanoj” en Dwingelo/NL. Respondo certa! Ineke Emmelkamp, Coranthijnestraat 75, Groningen, Nederlando.

**Memoru,** ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.



**Gekursanoj, 9 – 14-jaraj, deziras korespondi kun alilandaj gejunuloj.** Sur la foto (de maldekstre): Tomaso, Nolan, Maria, Tafi, Margo, Garth, Rikardo, Jim, Debi kaj Lesli. Skribu al ili ĉe: The Shire, 2542 N.W. Northrup, Portland, Oregon 97210, Usono.

**Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio,** skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

**Mi estos en oktobro 74 en Okcident-Afriko kaj Sud-Afriko,** de decembro ĝis februaro en Aŭstralio kaj Nov-Zelando, refugo kun interrompoj en Orient-Afriko. Gesamideanoj, kiuj deziras kontakti kun mi, skribu tuj al mi. S-ro Adalbert Masuhr, D-2200 Elmshorn, Schneiderkamp 33, FRG.

**Gotenburgo:** Urba mapo – praktika informo. Petu tiun novan belaspektan turisman prospekton. La mapo ankaŭ indikas Placon de Esperanto en Gotenburgo. Skribu en la internacia lingvo al: Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

**UK Hamburgo** – Fervoja karavano el Strasburgo, rabato ĝis 50%: Reynaud, Montfleuri, F-84380 Mazan.

**Institucio Hodler '68** varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donaco(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

**La lego-libro por lernemuloj kaj ridemuloj:** AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO. 20 dialogoj, 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj, 2000 konversaciaj frazoj, parol-turnoj, demandoj kaj respondoj. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendo-kostoj: 10%. Mendu ĉe via landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.





## GLUSTELO

Gluebla sur  
aŭtomobiloj ktp.  
Formato: 12 x 9 cm.  
Prezo: nur 0,90 gld.

Mendu ĉe Libroservo de UEA

## Profitu la ŝancon!!

### SPECIALA OFERTO!

Validas nur dum la monatoj majo, junio,  
julio kaj aŭgusto!

Ni povas liveri kontraŭ tre favoraj prezoj jenajn  
lukse binditajn romanojn:

|                                          | origina<br>prezo | favora<br>prezo |
|------------------------------------------|------------------|-----------------|
| <i>Palaco de danĝero</i> (M.Wagnalls)    | 3,50             | 2,50            |
| <i>Inferio</i> (H.J.Bulthuis)            | 4,20             | 3,—             |
| <i>Akbar</i> (J.Ziermans)                | 3,60             | 2,50            |
| <i>La alia pasinteco</i> (Rico Bulthuis) | 5,—              | 3,50            |
|                                          | Gld. 16,30       | 11,50           |

Se oni mendas la kvar verkojn kune, la prezo  
estas nur 10,— gld. plus sendokosto.

Mendu ĉe: **Internacia Esperanto-Instituto**  
**Riouwstraat 172, Hago, Nederlando**

aŭ ĉe: **Universala Esperanto-Asocio,**  
**Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-**  
**3002, Nederlando**

### ESPERANTAJ ELDONISTOJ!

Kiun el vi interesus eldoni mondglorajn porinfan-  
ajn ŝercajn fabelojn versformajn (entute 1200  
versoj)? Skribu registre al la tradukinto: Romano  
Grinŝpan, ul. Sajfulina 4, Visokovoltnij masiv,  
Taŝkento 125, Uzbeka SSR, Sovetio, 700125.

## ESPERANTO, PREZENTEBLA KIEL UNUECA LINGVO, KONFORMA AL SI MEM

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula  
Esperanto", de L. Mimó.  
Prezo 17,50 guldenoj.

## Ni kredu, ke venos tempo,

kiam la transpago estos ebla kaj ni rememoros  
pri la Fondaĵo "Canuto" kiel unu nobla, hela  
paĝo de la historio de la Esperanto-movado.

— membro en Bulgarujo

Dank' al la Fondaĵo Canuto mi ricevis la revuon.  
Mi ne havas sufiĉajn vortojn por rakonti mian  
ĝojon.

— membro en Indonezio

Via helpo estas granda por la Esperanto-movado  
en Litovio, ankaŭ por miaj gekursanoj.

— membro en Soveta Unio

Mi estas ege dankema al la Fondaĵo Canuto la  
eblecon membriĝi kaj ricevi eldonaĵojn de UEA.

— membro en Egiptujo

Mi ne povas imagi mian vivon sen membreco de  
UEA, revuo, jarlibro ktp.

— membro en Rumanujo

La Fondaĵo CANUTO estas speciala konto, en  
kiun eniras mondonacoj kaj subvencioj, kaj el  
kiu UEA pagas la membrokotizojn de meritaj  
personoj en landoj, el kiuj ne estas eble libere  
transpago al Nederlando. Donacojn por Fondaĵo  
Canuto akceptas la Centra Oficejo kaj la landaj  
kotizperantoj de UEA.



## VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

## POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*,  
eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita  
broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj  
spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%.  
Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,  
Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.



# Kontakto, JUNULARA REVUO KUN PLENKRESKA ENHAVO!

Kiu diras, ke oni pri KONTAKTO ne povas kalkuli? Ĵus aperis la lasta numero de 1973, sed kun enhavo, kiu estos aktuala ankaŭ en 1983! Nu, juĝu, mem, — jen la enhavo:


**FATAMORGANAJ TRAJTOJ DE LA RIĈECO** (La veraj riĉuloj estas la malriĉaj landoj kun grandaj rezervoj de mineraloj kaj aliaj ercoj)

**KLOPODO RETROVI PROPAN IDENTECON** (Zairo ne plu volas paroli france; la nova ŝtato serĉas sian propran, afrikan nacian lingvon)

**INSTRUADO DE SENSENCAĴOJ** (Rasa diskriminacio en lernolibroj)

**ĈU ETERNA SOLVO?** (Ĉu la Suno kapablas por ĉiam solvi la energikrizon?)

**AL KIU APARTENAS ZAMENHOF?**  
(5-paĝa studo de N.Z.Maimon pri la etna kaj nacia apartenoj de d-ro Zamenhof)



Abono: NUR 11 (por Nederlando 11,44) guldenoj.  
Eldonas: TEJO, N. Binnenweg 176, Rotterdam 3002.

## SENPAGE AL POLLANDO!

Senpagan rondvojaĝon tra Pollando kaj multajn objektajn premiojn oni povas gajni en la nova konkurso-enketo de la Pola Radio.

Por partopreni en la lotado de la premioj oni devas respondi al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. *Kioman lokon, laŭ via opinio, Pollando okupas en la mondo laŭ la vidpunkto: de la areo de la lando, nombro de loĝantoj, industria produktado?*
2. *Kiuj polaj varoj kaj servoj ĝuus sukceson en via lando? Kiuj pliaj ebloj, laŭ via opinio, ekzistas en tiu ĉi sfero?*
3. *Kion vi opinias pri la aktuala rolo de Pollando en Eŭropo kaj en la mondo?*

La respondojn oni sendu laŭ la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando, ĝis la 15-a de junio 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso-enketo estos anoncitaj en la elsendoj de la Pola Radio la 30-an de junio 1974.

Ni deziras al vi bonŝancon en la lotado de la premioj!

Samtempe ni informas, ke la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio estas aŭdigataj tri fojojn tage:

6.00 h. ondolongoj: 200m, 31m, 49m

16.30 h. ondolongoj: 31m, 41m

22.30 h. ondolongoj: 200m, 49m.

La elsendo-horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo.

Al ĉiuj esperantistoj ni volonte disponigos la presitan program-informilon pri niaj Esperanto-elsendoj.

**POLA RADIO**